

Enhavo

Okazis ankoraŭ antaŭ Julio	3
Jubilea KIES en Neve-Ŝalom (Pac-oazo)	3
Somero de 2010.....	4
42-a Landa Fervojista Amika Esperanto-Renkontiĝo-02.04.07.2010. Pécs	4
17. Internacia Medicina Esperanto-Kongreso: 03-08.07.2010	7
Hódmezővásárhely - Szeged	7
Yumeiho-Terapio en Kubo	11
Kontakto per Jarlibro de UEA.....	11
Aŭtobiografio	12
Malbona elekto.....	12
La Insulo Goreo.....	12
Vodou aŭ Vodou	13
Signifo de la vorto Haiti	13
„Roskilde Festivalo 2010”	14
Novaj rekordoj dum la 12-a KER-ekzamensesio.....	14
UK 2010	14
Informcele	14
Kenja.....	14
Festparolado de Probal Dasgupta.....	15
ĉe la Solena Inaŭguro de la 95-a UK	15
„Gravaj informoj pri KER-ekzamenoj”	17
Novajĝoj ĉe la UK en Kubo	17
La bona lingvo ankoraŭ pli bona.....	18
Kiel agi en esperantistaj dezertoj	18
Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko	18
Salutmesaĝo de.....	19
Louis Christophe Zaleski-Zamenhof.....	19
Lerni ludante	19
Rezultoj de Belartaj Konkursoj 2010	20
Korekto.....	20
Oratora Konkurso	20
Aŭtora Duonhoro	21
Rezolucio de la 95-a Universala Kongreso de Esperanto	21
Aldone al la mallongaj notoj en la Kongresa Kuriero.....	21
Listo „la bona lingvo”	22
Gratulo.....	22
15. Jaras la Societo de Tokaj-montosubaj Kreantoj / HAT/	22
Barko de Noa.....	24
Ŝercoj.....	25
Al ĉiuj, kiuj jam estas sufiĉdelonge junaj	25
11.07.Mondotago pri la Naskiĝokvanto	26
26.07.Tago de la Internacia Lingvo	26
Kion mi povas danki al Esperanto?.....	26
13.08.Mondotago de la Maldekstramanuloj.....	29
La sensa vojaĝo	29
Urbo Komárom – „Monostori-erőd” / Fortreso Monoștor.....	29
La hamstro kaj Dio la Ĉiopova	29
240 jaras la Ferfabriko de Miskolc.....	31

Okazis ankoraŭ antaŭ Julio

El la revuo *Israela Esperantisto* (nro151) ni informiĝis pri kortuŝa ceremonio, okazigita en Jad Vaŝem, Jerusalemo koncerne la memoron pri la viktimoj de Holokaŭsto. Krome ni povis legi ankaŭ pri multaj interesajoj el la revuo ricevita donace de la Esperanto-Ligo de Israelo. Ni taksas la revuon altvalora pro ties apero kaj enhavo. Mi mencias el ĝiaj pluraj artikoloj, ekzemple; la artikolojn de s-ro Amri Wandel pri la jaro 2009: la Internacia Jaro de Astronomio, kaj Jubilea KIES en Neve-Ŝalom (Pac-Oazo), artikolojn de Josef Ŝemer: Rememoroj de israela Esperanto-veterano, Letero de Zamenhof al (HEA=Hebrea Esperanto-Asocio) en la Nacia Biblioteko, Jerusalemo, artikolon verkitan de Esti Saban: Internacia Festivalo en Nördlingen, kaj la artikolon. Iluŝka verkitan de s-rino Tereza Kapista (Serbio). Bonvolu legi nun ankaŭ vi pri unu el inter, la bonegaj artikoloj de bele prezentita organo de Esperanto-Ligo en Israelo

Sinjorino Adri Pásztor.

Jubilea KIES en Neve-Ŝalom (Pac-oazo)

Fine de oktobro okazis la 10-a *Komuna Israela Esperantista Semajnfino*, kiu ekde 2001 estas la plej regula Esperanto-renkontiĝo de Israelo (kiel Renato Corsetti prave asertis, tio estas efektive la israela E-Kongreso). En la lastaj jaroj ĝi fariĝis ankaŭ internacia. Ĉi jare, el ĉ. 60 partoprenantoj, 11 venis el eksterlandoj: Rusio (7), Italio (2), Germanio (1) kaj Japanio (1). Sekve tiu-ĉi jubilea KIES estis la plej granda kaj plej internacia ĝis nun. Ĉi-foje, estis ĝi tritaga intensa kunveno en vilaĝo Pac-oazo (Neve-Ŝalom / Ŭaĥat a'-Ŝalom) apud Jerusalemo, kie harmonie kunloĝas judoj kaj araboj,

Samloke okazis en la jaro 2000 seminario antaŭ la UK de Tel-Avivo. La situo estis perfekte taŭga por la KIES-ĉeftemo: „Paco kaj kunekzisto”. Kadre de la ĉeftemo la partoprenantoj aŭdis de loka araba loĝanto pri la vivo de judaj kaj arabaj familioj en tiu unika vilaĝo(kiu eĉ havas retpaĝon en Esperanto), Renato Corsetti gvidis provokan diskuton pri la Mezorianta konflikto „Demandoj al israelanoj pri paco kaj la araboj”, kio instigis viglan partoprenon. Alia speciala kaj populara programo estis „Invito al GO-ludo” kiun gvidis Gian Piero Salvio helpe de komputila ekrano. Okazis multaj pliaj prelegoj, kiel „La kibuco en la nova epoko” de Cvi Ŝolt aŭ „400 jaroj de la teleskopo” de Amri Wandel, komuna kantado kaj dancado kaj pluraj ekskursoj al la belaj naturo, monaĥejoj kaj historiaj lokoj en la ĉirkaŭaj regionoj. Oni eĉ produktis specialajn T-ĉemizojn por la KIES. En la tradicia resuma forumo, multaj el la partoprenantoj opiniis ke ĝi estris la plej sukcesa KIES ĝis nun, pro la etoso, la riĉa programo kaj la variaj ekskursoj. Fotoj videblas en la retalbumo: <http://picasaweb.google.com/Amri.nivut/10aKIES>.

Kiel ĉiujare, la semajnofinon kunorganizis Nava Cinori kaj Amri Wandel. Raportoj pri la KIES (R. Corsetti) kaj post KIES (A. Wandel) aperis en *La Ondo de Esperanto* kaj en revuo *Esperanto*. Por la eksterlandaj partoprenantoj estis organizita ekskursiva programo al la ĉefaj vidindaĵoj en Israelo; dum la tuta semajno israelaj samideanoj akompanis kaj gvidis la gastojn al Jerusalemo, la Morta Maro kaj Masado kaj al la nordo – Hajfo (Bahaaj ĝardenoj, Nazareto (Preĝejo de Anunĉiado) kaj Akko. La turisma programo komenciĝis jam du tagojn antaŭ la KIES; oni vizitis Jerusalemon – la malnovan urbon kaj ankaŭ la novan, kie i.a. ni haltis ĉe la strato Zamenhof kaj la Zamenhof-domo.

Dek eksterlandanoj (el Rusio, Italio kaj Japanio) kaj tri israelanoj ekveturis post la KIES de Pacoazo al la Morta Maro. La ĉiĉerona blazono estis granda verda stelo. Post kamel-rajdado apud la punkto „altec” ni descendis pliajn 400 metrojn sub la marnivelo, por vizito

de vera oazo – Ejn Gédli, en la judea dezerto. Sekvis banado en la Morta Maro, kiu estas ne nur la plej malalta loko en la mondo, sed ankaŭ la plej sala, tial ĝia akvo estas tiom densa ke eblas legi gazeton flosante. Ni kompreneble legis la revuon Esperanto!

Plej impona estis, la vizito de Masado. Kelkajn tagojn pli frue la eksterlanda grupo vidis en muzeo en Jerusalemo la rulaĵojn de la Morta Maro (Kumran), kiuj estas skribitaj samloke kaj samepoke kiel la sieĝo de Masado. Tricent hebreaj familioj dum tri jaroj kontraŭstaris tri romiajn legiojn, kaj fine sinmortigis por ne esti kaptitaj kaj slavigitaj. Ni vizitis la Masadan palacon de Herodo kiu bele konserviĝis dum du mil jaroj, kaj spektis filman prezentadon pri drama historio de la arkeologia restaŭrado. Reveninte al Jerusalemo, Roza (la sola judino en la grupo) insistis viziti Jad Vaŝem, kaj tiel en unu tago ni vidis du el plej gravaj simboloj de la juda popolo. Dum interesa kaj ĝuplena Esperanto-semajno mi akompanis la eksterlandajn gastojn kaj mia ĵipo kvazaŭ fariĝis ilia surrada hejmo...”

Amri Wandel

Somero de 2010

Jam pluraj jaroj pasis de tiam, kiam mi legis la bonhumoran, karvoĉan libron: „Somero arbaro, kukolo” prezentita departementon Baranya, verkitan de la verkisto, ĵurnalisto; Tibor Tüskés. Nun mi rememoras lin, kaj ankaŭ mi proponas por vagadi enarbare, sur la kampoj, por forpeli la tutjaran urban lacecon. Sed mia propono ne signifas, ke ne estas elekteblaj aliaj veturadoj kiel someraj ekskursoj. Esprantistaj aranĝoj okazas tutjare sur belaj kaj interesaj lokoj. Ni nun elektis du eksterlandajn kaj du enlandajn aranĝaĵojn kiel vetureblecojn. La pli lastajn partoprenis ankaŭ geedzoj Pásztor, membroj de Miŝkolca „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo. Kial ni elektis ĝuste tiujn? Ĉar tiuj ekskursoj estas eksterordinaraj, meritas prezenton al niaj legantoj. Ek! Ekskursu kun ni!

S-rino Adri Pásztor

42-a Landa Fervojista Amika Esperanto-Renkontiĝo-02.04.07.2010. Pécs

Kune kun la Miŝkolcaj geedzoj Pásztor kaj la sukceson de la renkontiĝo certigintaj sinjoroj Istvan Szűcs kaj Alfonz Moró, partoprenis ĉi tiun renkontiĝon entute 60 personoj. Inter la ĉeestantoj estis krom la hungaroj Aŭstro, Ĉeĥoj kaj Rumanio. El Rumanio la kara juna virino: Rodica Todor honorigis nian societon kun sia ĉeesto, kiu antaŭ nelonge iĝis prezidantino de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio.



S-ino Rodica Todor (Rumanino) kaj sinjoro Martin Stopping (el Aŭstrio) dum nia hejmenvojaĝo. – Fotis sinjorino Adri Pásztor

Dum la unua tago, parto de la grupo faris ekskurson al Palkonya, la alia al Tettye; al la malnova urboparto de urbo Pécs. Ĉar ni alvenis pli malfrue, ol estis la komenco, ni vizitis la renovigitan urbocentron.

Dum la dua tago ni vizitis la malnovkristanajn tombokelojn. La de 4. jarcenta malnovkristana komunumo de la romepoka Sopianae konstruitaj tombokonstruaĵoj, kapeloj, tombokeloj videblas en tombejo de la iama loĝantaro vivinta ĉi tie. Oni povas vidi tie i.a. ankaŭ la sepsegmentan tombokonstruaĵon inter la ceteraj. Pli malfrue ni vizitis la katedralon de Pécs kaj ĝian subpreĝejon. Poste ni partoprenis esperantlingvan sanktan meson en Moskeo de Ghazi Kasim, kio nun estas destinita por kristanaj diservoj. Posttagmeze okazis la florkronado de memortabulo de d-ro Stefano Bácskai en Esperanto-parko de Pécs. Videblas tie ankaŭ krom la memortabulo de d-ro Stefano Bácskai ankaŭ memortabuloj de d-ro L.L.Zamenhof, d-ro Gabrielo Bálint, Julio Baghy, d-ro Kolomano. Kalocsay, Alfonz Pechan kaj Elizabeta Pallós, kaj aliaj lokaj esperantistaj elstaruloj. István Gulyás, prezidanto de la Hungaria Fervoĵista Esperanto-Asocio parolis rekonante pri la farantoj de la memorparko kaj pri la tabulojn farinta Roberto G.Nagy. László Pásztor, membro de la Miŝkolca „Király Lajos” Esperanto –Amika Rondo metis florkroneton de la EAR, apud florkronon de la fervojistoj kaj salutis la ĉeestantojn.



Sur la bildo videblas unu grupo de partoprenantoj de la florkronada festo, en la Esperanto Parko en Pécs – Fotis István Sutka /Kelebia/

S-ino Eva Faragó, esperantistino de urbo Tata kaj sia grupo rememoris korvarme la ĉijare forpasintan d-ron Franciskon Jáki. Ili metis florkronojn nome de esperantistoj de urbo Tata, al la memortabuloj. Post la florkronado libera parolado okazis en iu restoracio, kie Ferenc

Phersy konigis laboron de la Hungaria Fervojista Esperanto-Asocio. Poste István Gulyás transdonis diplomojn por tiuj, kiuj subtenis la preparigon de memortabulo de d-ro István Bácskai. Ankaŭ la geedzoj-Pásztor ricevis memordiplomon.

Dum la tria tago ni rigardis la Barbakanon, krom la iama Jakovali Hassan, la Poŝto-Palacon kaj ekspozicion de hungara pentroartisto Munkácsy.

Moskeo de
Trilogio de la



Sur la bildoj videblas: Ĉefkatedralo de urbo Peĉ, ties enirejo, detalo de ĝia interna parto, memortabulo de la papo Johano Paŭlo la II-a, ĉe la ekstera muro de la ĉefkatedralo, la

Moskeo, skulptaĵo de Johano Hunyadi, Ĉi fotoj estas pejzaĝbildoj de departamento Baranya, kie sinjoras ankoraŭ tiam la akvo (inunditaj kampoj).

Tiu ĉi renkontiĝo estis familietosa, ties organizantoj estis sinjoroj D-ro Jozefo Halász /Miskolc/ kaj Alfonz Móró/Pécs/.

Ni dankas la inviton, ni fartis bone „ en la 2010. jara Eŭropa Ĉefurbo de la Kulturo.”

Geedzaj-Pásztor el Miskolc

17. Internacia Medicina Esperanto-Kongreso: 03-08.07.2010 Hódmezővásárhely - Szeged

Lokoj de kongresoj estis: 1. Kolegio de Agrokultura Fakultato de Scienca Universitato de Szeged, en Hódmezővásárhely, n-roj 10-12 strato Petőfi kaj en Szeged, en iu konstruaĵo apartenanta al Scienca Universitato de urbo Szeged, strato Temesvári, n-ro 31.

La dormejoj estis aranĝitaj parte sur loko de la Kongreso en la Kolegio, kaj parte en la pensiono „Kenguru” en Hódmezővásárhely.



Pensiono Kenguru (Pensiono Kanguruo)



Ni, miŝkolcaj geedzaj-Pásztor partoprenis la kongreson de la 5-a ĝis la 8-a de julio 2010. Niaj geamikoj informis nin, ke sr-o Johano Lázár, urbestro pere de sia vicurbestro salutis la ĉeestantojn, poste d-ro Imre Ferenczy, prezidanto de UMEA malfermis la kongreson kaj deziris utilan laboron al la gepartoprenantoj.

Patronoj de la kongreso estis:

D-ro Włodzimierz Opoka, ĝenerala sekretario de UMEA, el Jagello universitato de Krakovo. **Géza Knyúr**, DELFIN komputika AK de Hódmezővásárhely, **István Beharóczy**, ĉefdirektoro de Ebena Porcelanfabriko de Hódmezővásárhely, **Budapeŝta Medicina Esperanto-Grupo**, **Hungaria Yumeiho-Societo**.

1. Sciencaj prelegoj okazis pri terapio de la kontraŭ tumoroj, pri la medicina-socia zorga sistemo kaj pri roloj de la kuracplantoj en la medicina terapio.
2. Estis ekspozicio de Maria Kálvai-Szente Varga: ceramikaĵoj de entrepreno de Garai kaj vizitado de la ceramikaĵfabriko de Garai.
3. Yumeiho-prezento pri la jogo-terapio.
4. Naturaj kuracmetodoj- muzika terapio.
5. Fizioterapio.
6. Kuracmetodo de la vertebraj malsanoj.
7. Farmacio – esploraj rezultoj.
8. Terapiaj kuracmetodoj.
9. Urborigardo en Szeged.
10. Yumeiho-sekcio: ekzercado, prepariĝo al ekzameno.
11. Prezento de teatraĵo de Georgo Handzlik.
12. Ekskurso al Ópusztaszer al la historia memorloko, skanzeno.
13. Yumeiho-sekcio: skriba ekzameno kaj ekzercoj.
14. Urborigardo en Hódmezővásárhely.
15. Ekzercaj ekzamenoj antaŭ Internacia Ekzamena Komitato.
16. Fermo de la 17. Internacia Medicina Esperanto-Kongreso, transdono de la diplomoj.

Inter la 63 partoprenantoj de la kongreso estis ankaŭ eksterlandanoj: el Japanio, Pollando, Ĉeĥio, Italio. La prelegoj okazis angle, hungare kaj Esperante. La tekstojn hungarigis kaj esperantigis s-roj d-ro Imre Ferenczy, d-ro Ludoviko Molnár, Imre Szabó, d-ro Georgo Flendler, d-rino Julianna Farkas, kaj s-ino Kornélia Nagy. Ok organizantoj helpis la laboron de la ĉeforganizantino Katalin Faragó.



Sur la foto meze videblas sinjoro d-ro Imre Ferenczy, prezidanto de UMEA, de li maldekstre videblas: iu preleganto kaj subtenanto de la Kongreso: d-ro farm. Włodzimierz Opoka, aliflanke videblas la redaktoro de la reta revuo Nordhungaria Informo: s-ro László Pásztor.

Estas menciinde, ke la urbestro de Hódmezővásárhely donis signifan financon subtenon por la aranĝo, inter aliaj li certigis la festalonon de la urbodomo.

Katalin Faragó faris gigantan laboron, li kompilis la programojn, elektis la prelegantojn, organizis la aferojn de la dormejoj, manĝadon, ekskursojn, ekspoziciojn, prezenton de la teatraĵo. Ŝi larĝskale priatentis ĉiujn detalojn de la aranĝaĵoj. Tio estis granda laborprodukto.

Gratulojn al d-ro Imre Ferenczy, s-ino Katalin Faragó kaj ŝia grupo de helpantoj, pro ilia elstara trupa-laboro. Dankojn pro la invito! Ni ege bone fartis, kaj estas certaj, ke ĉiuj akiris same neforgeseblajn travivaĵojn dum la Kongreso. Historion de nia dumkongresa ekskursejo al Memorparko de Ópusztaszer (Opustaser), ni komunikos en iu nia pli posta revuo.



Sinjorino Katarina Farago laborante



En la memorparko de Ópusztaszer, la halo de Rondpentraĵo - pri la patrujkonkremento de Hungaroj, pentrita - de Árpád Feszty, estas nun renovigata.



Ŝton-statuo de rikoltantaj terkulturistoj



Fiŝkaptista domaĉeto interne kaj ekstere



Memorplako pri la Monda Hungararo



Domo de Hungararo de la Mondo



La fotoj montras bildojn pri ekzercaj ekzamenadoj pri la „Yumeiho” - japanmanieraj kurakterapiaj masaĝistoj – fotis s-ro Ladislao Pásztor kaj s-ino Adri Pásztor.

La juĝistoj estis: s-ino Katarina Faragó (Hungarino) kaj la pola d-ro farm. Włodzimierz Opoka: direktoro de la UMEA Shinoda Kuracejo. Sur la fotoj oni povas vidi la juĝistojn, la ekzamenatojn, kaj iliajn helpantojn dum la ekzamenado: Prezidanto estis: d-ro Imre Ferenczy.



Sur la grup-bildo videblas unu grupo de partoprenantoj de IMEK. Sur ĝi rande videblas s-ino Katarina Faragó vestita en blankan bluzon kaj pantalonon. La foton sendis s-ro d-ro Imre Ferenczy.

Ni deziras ankaŭ al ilia plua vivo bonan sanon, multe da ĝojoj, sukcesoj.

Geedzoj-Pásztor el Miskolc

Yumeiho-Terapio en Kubo

Francisco Briel de Canas, Francel Briel Gil Yumeiho-terapio alvenis al Kubo dum la 75-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Havano, Kubo en 1990 pere de sia kreinto d-ro Masayuki Saionji, el Japanio. Ni prezentos diversajn kuracitajn kazojn, kelkajn el ili pere de pacientaj atestoj, en kiuj oni povos konstati la bonefikojn de nia terapio. Fine ni elmontras praktike al partoprenantoj ĉe nia konferenco la bonajn efikojn de nia terapio.

/ http://uea.org/kongresoj/uk_2010.html /**Havana Karavano N-ro 1**: Kleriga Lundo/

Kontakto per Jarlibro de UEA

La malsupre nomita sinjoro Kossi Woudji el Afriko, trovis mian nomon kaj retadreson en la Jarlibro de UEA. Li skribis al mi, kaj ni rete interamnikiĝis, komencante la konatiĝon kun interŝanĝoj de niaj aŭtobiografioj kaj kulturaj interesaĵoj. Laŭ lia konsento mi komunikas nun kaj lian aŭtobiografion, kaj liajn verketojn por konigi ilin al vi. Bonvolu akcepti lin kaj la verkojn, kiuj estas vere legendaj kaj legindaj. Mi vere rememoras la nomon Goreo, sed nun mi ne trovis ĝin sur miaj mapoj, kaj ankaŭ ne en la Vikipedio malgraŭ granda signifo de la insulo. Ja Insulo Goreo funkcias memorloke, simile kiel niaj memorlokoj pri la viktimoj de Holokaŭsto. **Tiu insulo vere meritas, ke ankaŭ la gesperantistaro vizitu ĝin por honordoni antaŭ viktimoj de sklavismo, antaŭ suferejo de la afrikaj popoloj.**

Sinjorino Adri Pásztor

Aŭtobiografio

Mia persona nomo estas; Kossi. Mia familia nomo estas: WOUDJI. Mi estas Togolanda esperantisto en Senegalo. Mi konatiĝis kun Esperanto en la jaro 1997. Mi diplomiĝis pri alta nivelo de Esperanto lingvoscio en la jaro 2001. Mi estas instruisto de E-o, ankaŭ tre aktiva en turismo. Mi estas 40 jaraĝa. Rifuĝinta en Senegalo mi vivas tie ekde la jaro 2006. Mi parolas francan, Esperanton, iomete la anglan kaj la germanan. Plaĉus al mi iam viziti Hungarion. Mi estas verkisto. Mi tre ŝatas akcepti eksterlandajn gesamideanojn. Se iu deziras viziti Senegalon informu min mi helpos trovi la intesaĵojn. Mi loĝas en Dakaro, en Senegalo. Mi estas individuua membro de UEA. Gastiganto de Pasporta Servo de TEJO.

Kompreneble, mi jam verkis ankaŭ kelkajn tekstojn; tre interesajn kaj ankaŭ tre ridegajn historiojn.

Ili havas la jenajn titolojn:

- 1-) Diskuto inter surduloj
- 2-) Malbona elekto: temas pri la nigruloj kaj blankuloj.
- 3-) Historio de Insulo-Goreo en Senegalo.
- 4-) Pluraj poemoj.

Kara sinjorino Adri!

Mi vidis vian adreson en la jarlibro. Mi estas tre kontenta ekrilati kun vi.

Transdonu miajn sincerajn salutojn al via edzo.

Tre amike

WOUDJI Kossi”

Malbona elekto

- Temas pri la nigruloj kaj blankuloj -

Dio kreis Afrikon kaj la ceteran mondon, poste nigrulojn kaj blankulojn. En Afriko Dio lokis tion, kio povas plaĉi al la kreitaj homoj: multnombrajn bestojn por ĉasistoj, fiŝriĉajn riverojn por fiŝkaptistoj, fruktojn kiujn oni povas kolekti sen granda peno, kaj ĉiam varman veteron. En la ceterajn partojn de la mondo Dio metis malvarmon, glacieron, neĝon, malbonan teron, sed ankaŭ librojn kaj sciojn, kiujn ili enhavas.

Post tio Dio demandis unue la nigrulojn, kion ili volas elekti por si. La nigruloj elektis Afrikon, kaj la blankuloj do devis kontentiĝi pri la cetera mondo. Nu, la estonteco montris ke la nigruloj faris grandegan eraron. Certe, la blankuloj ĉiam suferis pro malvarmo kaj devis ĉiam multe labori por eltiri manĝaĵojn el la nefruktodona tero, sed la sciencaj enhavoj de la libroj donis al ili mirindajn povojn dank' al kiuj ili sukcesis konstrui komfortajn domojn, fari varmigajn vestojn kaj devigi la teron doni al ili grandan kvanton da fruktoj.

Kompreninte sian eraregan, la nigruloj nun deziras kleriĝi. Kaj ili nun multon lernas ĉe la blankuloj.

Verkita de WOUDJI Kossi.
(Nomata: Filo de malriĉulo)

La Insulo Goreo

La insulo Goreo malkovrita de la portugala naviganto Dinis Dias en la jaro 1444, situas okcidente de Dakaro en mezo de la maro. Oni vizitas ĝin per ŝipeto. La distanco inter Dakara haveno kaj la insulo estas almenaŭ tri kilometroj. Ni vizitis tiun lokon kun eksterlandaj geamikoj. Atinginte ĝin, ni estis tre surprizitaj de la grandeco kaj la beleco de la insulo. Ĝia

nuna historio plenas pri paco. Per nek veturiloj, nek motorcikloj, nek bicikloj oni povas vojaĝi tien kaj tie. La stratoj estas ne asfaltitaj kaj tre mallarĝaj, kaj apud ĝiaj trotuaroj estas plantitaj belaj floroj. La insulo havas domojn konstruitajn el brikoj laŭ Kolonia-stilo, kaj tre fortikajn ferajn balkonojn. Insulo Goreo estas plena je turismaj vidindaĵoj, kies plej gravaj artobjektoj estas: la Historia Muzeo, la Unua Moskeo en Senegalo kaj precipe la Domo de Sklavoj.

La negro komercon komencis unue la Araboj. Poste sekvis en la 15-a jarcento Hispanoj kaj Portugaloj, kiuj okupis marbordojn de Okcidenta-Afriko. De la 15-a ĝis la 18-a jarcento aliaj Eŭropanoj atingis Afrikon, ankaŭ Germanoj, Nederlandanoj, Francoj, Danoj ktp. La komerco de sklavoj daŭris 350 jarojn en Afriko. Ĝi estas farita kiel triangula desegno. Tiu mekanismo estas tre simpla.

La ŝiptrafikantoj elvenis de grandaj havenoj de eŭropaj landoj kiel Bordeaux, Nantes, La Rochelle, Londono, Amsterdamo, Hamburgo, ktp. La trafikŝipoj atingis Afrikon plenaj je senvaloraj varoj: Ludiloj por infanoj, alkoholoj, ŝuoj, ĉapeloj, speguloj, kombiloj, por interŝanĝi kontraŭ sklavoj. Atinginte Amerikon ili interŝanĝis tiujn kontraŭ alkoholaĵo rumo, sukeroj, tabakoj, indigo, ekzotikaj produktaĵoj. De Ameriko ili returnis al Eŭropo por vendi tiujn pro tre altaj prezoj.

Insulo Goreo estis elektita placo por la komerco de sklavoj. Nun pluekzistas Domoj de Sklavoj, kaj vizito al tiaj domoj okupis la rond-vojaĝon. La insulo estas vojkruciĝo de centra komerco tre grava. Multaj negrotafikantoj konstruis domojn tie. La plej historia estas la Sklavdomo konstruita de la Nederlandanoj en la jaro 1776. Ĝi estas renovigita helpe de Francio en 1990. La unua etaĝo estas por la estroj kaj por stoki varojn. La domo tre apudis de la marbordo. Sube ĝi estas dividita en kvar partojn. Unu parto estas por la infanoj kaj virinoj. Dua estas por la jun-knaboj kaj por viroj. Tria estas la malliberejo.

Dum la foriro kelkaj sklavoj rifuzis eniri la trafikŝipon, batalante kontraŭ estroj kaj kelkafoje vundis ilin tre grave. La kvara parto de la servas por la gardistaro. La domo havas du pordojn. La ĉefa eniro; la dua estas malfermita al la maro kie haltas la trafikŝipoj. Tiu pordo havas specilan nomon. (Laŭ la franca lingvo ĝi estas (Porte du voyage sans retour) Adiaŭiga pordo. Tiu spirita signifo mirigas vizitantojn aparte la Negrojn. La Domo de la Sklavoj estas neforgesebla simbolo, kiu memorigas la suferon de la Afrika popolo.

Vodou aŭ Vodù

Ĝia signifo devenas de la religio animismo. La animismo estas formo de religio bazita sur la kredon, ke ĉiuj objektoj en la mondo havas propran animon, ligitan aŭ neligitan al ili. La vorto vodù, havas la terminon Vodun, kiu por la loĝantoj de la suda parto de Benino kaj Togolando, signifas tion kio estas kaŝita en misteron. Afrikaj sklavoj alportis Vodunojn al Usono. Tiuj sklavoj transdonis al siaj idoj tiujn afrikdevenajn kulturaĵojn kiuj disvastiĝas en la tuta kontinenta Ameriko kaj precipe en Usono Brazilo, Kubo, Haitio ktp. La sklav-idoj klopodis enkonduki la vorton Vodù en la kristanismon por la Katolika Dio-adorado kaj ritoj. Tiu vorto ekzistas en (Hollywood) Haitio, Kubo, Brazilio por nur citi kelkajn lokojn. Dum Vodù-festivaloj aŭ ceremonioj, la adeptoj, dancante, falis/falas teren transe. Ĉiun jaron en pluraj partoj de Ameriko, Vodun-festivaloj okazas kun riĉaj kaj interesaj programoj.

Signifo de la vorto Haiti

Verdire estis sklavoj de Benino kaj Togolando kiuj kreis Haition. "Hai" signifas en la lingvo por la sudaj loĝantoj de Benino kaj Togolando (iri, vojaĝi) Ti = signifas (nereveno). La

vorto "Haiti" havas simbolon por tiu lando, ponto de vojaĝi kaj ne reveni (en Benino) kaj Haitio estas la ĉefa pordo de la sklavdomoj sur la insulo Goreo. Pordo de vojaĝo sen reveno.

WOUDJI Kossi
Togolanda esperantisto vivanta en Senegalo

„Roskilde Festivalo 2010”

Dana Esperanta Junulara Organizo kaj FESTOKLUBO organizis senpagan esperantistan renkontiĝon en Danio dum Roskilde Festivalo, kiu estas la plej granda muzikfestivalo en Norda Eŭropo inter la 26a de junio kaj 5a de julio 2010 . Ĉi-jare invititaj estis 100 esperantistoj, al la festego kun 175 muzikgrupoj.

/Laŭ la listo de Heamembraro/

Novaj rekordoj dum la 12-a KER-ekzamensesio

[KER - Komuna Eŭropa Referenckadro]

La 5-6-an de julio 2010 en Slovakio kaj Usono paralele okazis la 12-a sesio de la novaj KER-ekzamenoj.

La aranĝoj SES [Somera Esperanto-Studado] en Pieshtany (Slovakio), renkontiĝo de lernuanoj [www.lernu.net] kaj NASK [Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto] en la universitato de San-Diego (San Diego) gastigis la 12-an sesion de la nova ekzamensistemo.

Danke al la zorga kaj aktiva antaŭpreparo kaj la multnombra partoprenantaro de la eŭropunia Grundtvig-projekto dum la ĝemelsesio la ekzamenojn trapasis entute 48 personoj, je unu pli ol la sesio dum la UK en Bjalistoko.

Por pli da detaloj ==> <http://www.edukado.net/>

Pri la "Grundtvig-projekto" vidu:

http://ec.europa.eu/education/lifelong-learning-programme/doc86_fr.htm

bedaŭrinde nur en la angla, germana kaj franca (ĉar la kultur-lingva rasismo bonfartas ĉe Eŭropa Unio!!!).

/Germain Pirlot <gepir.apro@pandora.be> (Universala Esperanto-Asocio)/

UK 2010

Dum la UK-semajno la Radio Havano elsendis ĉiutage unu horan programon, kiu estis elŝutebla ĉe: www.ameriko.org

sinjorino Adrienne Pásztor

Informcele

Kenja

Kenja lernejo konsentis, ke oni instruu Esperanton al unu klaso....

Germain Pirlot

Festparolado de Probal Dasgupta ĉe la Solena Inaŭguro de la 95-a UK

Estimata s-ro Alta Protektanto, estimataj eminentuloj sur la podio kaj en la salono, estimataj kongresanoj,

Bonvenon denove al la ĉiujare mirakla Universala Kongreso. Novaj kongresanoj, precipe homoj neniam antaŭe aliĝintaj al internacia Esperanta aranĝo, trovas en sia unua UK personan sperton pli superŝutan ol ili imagis. La eterna homa deziro atingi transbaran, transmaran kaj tamen personan amikecon aparte pure esprimiĝas en niaj kongresoj. Ĉi-jare la kongreso suplementas sian kutiman bonvenigon per io tute speciala – Unuiĝintaj Nacioj deklaris ĝuste la 18-an de julio kiel la Internacian Tagon de Nelson Mandela. Ke ni inaŭguras kongreson ĝuste en unu el la landoj de la monda sudo en la 92-a naskiĝa datreveno de tiu granda sudafricano, kiu kontribuis al la interproksimigo de la kulturoj kaj kontribuis al la paco en la multlingva, multetna Sudafriko, estas datkonverĝo tute aparte priĝojinda. Ni ĉiuj scias, ke lia ĉielarka Sudafriko inde gastigis la mondpokalan futbaladon, kie la fina ĉampioniĝo de hispanlingvanoj eble varmigis iujn korojn en ĉi tiu mondparto! Sed pri tiu temo ni parolos tuj post mia parolado. UEA sendos mesaĝon al Nelson Mandela, kiel ni klarigos. Ĉi-momente ni revenu al la bonvenigado al niaj unuafojaj kongresanoj. Tiuj niaj unuafojuloj evidente neniam forgesos sian sperton. Sed al kiuj ili plej ŝuldas tiun ĉi sperton neforgeseblan? Ĉefe al tiuj inter vi, kiuj estas veteranoj, kiuj dudek aŭ kvardek aŭ kvindekfoje kongresis, kaj kies senmanke varma *veterana* ĉeesto fasonas agrablan *veteron* de la unika esperantista medio de amikeco trans la kontinentoj, la insuloj, la polusoj kaj la tropikoj, inter kiuj ni cirkulas kongrese. Al vi veteranoj ni esprimas nian koran dankon; ni dankas vin en Esperanto – en lingvo de kontrastoj kaj de simileco. La similoj kaj la malsimiloj ambaŭ grave rolas en la amikeco. Kial donas al mi plezuron veni al tiu ĉi lando el mia same tropika lando? Pro la simileco inter Kubo kaj Barato. Tamen, ĉu ni kontinentanoj ofte vizitas insulojn?

Ne, kaj tiu faktoro instigas min dum tiu ĉi vizito pensi al aliaj insuloj. Tiun mian kontinentanan kontentiĝon mi ŝuldas ĝuste al la kontrasto. Kial mi subite elokventas pri kontrastoj kaj malkontrastoj? Nu, vi scias, ke la ĉi-jara kongreso temas pri la interproksimiĝo de kulturoj en multlingva mondo, ĉu ne? Ni bezonas tiel la similojn kiel la malsimilojn.

Se ni ne estus dekomence almenaŭ iugrade similaj, tiam ni neniel eĉ komencus reciproke proksimiĝi. Aliflanke, se ni tro similas, aŭ sukcesos tro similiĝi, tiam ni per tia interproksimiĝado nur tedados unu la alian. Hodiaŭ ni scias, ke sur planedo feliĉe multlingva ĝuste nia investo pri la diverseco garantias, ke ni nepre ne fariĝu tro similaj, ĉu ne? Tiu ĉi ideo estas iom nova por ni ĉiuj. Antaŭe la idealistoj kutime pledis por idealoj unuecigaj. En unu lando ili pledis por nacia unuecigo. Sur la monda skalo ili strebis al harmonio, kiun ili komprenis kiel sendivide, sendiference unuecigitan homaron. Sed ni hodiaŭ lernas deziri unu konektitan planedon, kiu estimas kaj flegas ĝuste la diversecon. Tiu ĉi lernado okazas ne nur en Esperantujo: la media katastrofo devigas nin serĉi vojojn por savteni la vivdiversecon kaj disvolvi aliajn parencajn diverseco-ideojn. Sed ni esperantistoj jam de longe pioniris, kaj veterane kultivas, similan kampon. Ni laboras por savteni la diversecon de konversacioj. Ni aspiras al tutplaneda konversacio inter la lokaj kaj regionaj konversacioj, kiu savtenas ilian lokan kaj regionan vigecon kaj pere de ili la demokration. En 1888 Zamenhof transdonis la taskon pludisvolvi sian lingvan prototipon al la publiko uzonta lian novnaskitan projekton. Ekde tiu mejloŝtona jaro la esperantista komunumo evoluigis tiun ĉi idealon novan por la homaro. Kaj kiom ni progresis en tiu disvolva laboro? Kion nia unike esperantista konversaciado ĉerpis el la fonto ofte nomata la globa sudo – el Kubo kaj aliaj landoj de Latinameriko, Afriko kaj Azio? En la fruaj jaroj de la esperantista konversacio, ne havis

reliefan lokon la sudaj voĉoj. La prahejmoj de la Esperanta lingvo-kultivado – Rusujo, Svedujo, Francujo – dialogis kun aliaj orient- kaj okcidenteŭropaj socioj, kiuj ĉeftrafikis ĉirkaŭ tiu akso. Ankaŭ kiam la Esperanta literaturo serioze floris, ni vidis prosperi sinsekvajn hungaran kaj skotan skolojn post la respektivaj mondmilitoj. Iliaj revuoj gastame akceptis kontribuojn ankaŭ el la sudaj landoj. Tamen ili eble ne plene komprenis, ke la konsisto de la monda konversaciantaro ŝanĝiĝas, kaj ke tial ankaŭ nia unika kultura konversacio inter kulturaj konversacioj devas remuldi sin laŭ tiu nova konsisto.

Unu homo multe fortostreĉinta por alporti tiun komprenon estis Tibor Sekelj. Li vojaĝis ĉien, parolis kun ĉiuj, kaj senlace verkis pri siaj spertoj kaj konversacioj. Ekzemple, en la ikona porinfana verko *Kumeŭaŭa, filo de la ĝangalo*, Sekelj montras sin lernanta de la sudamerika indiĝenpopola knabo Kumeŭaŭa, kies intelekta mentoro estis pliaĝulo el lia popolo, ‘maljuna Maloa’. Sekelj certe ekzemplis la iom troan ekzotikismon de siaj tempo kaj loko. Sed ene de komprenindaj limoj li heroe strebis rompi murojn, vastigi konversaciojn kaj devigi la nordon kaj la sudon lerni unu de la alia. Iuj gvidaj figuroj en la eŭropa esperantista junularo en la sesdekaj jaroj lanĉis novan tipon de konversacio kun la sudaj landoj. Tiu generacio identigis ĉi-rilate du celojn. Unuflanke ili laboris por plikonsciigi la civitanojn en la nordaj landoj kaj intensigi la konkretan evoluhelpadon al la sudo. Aliflanke ili strebis por ke la sudajn voĉojn en Esperantujo la nordaj agantoj akceptu kiel dignajn kamaradojn, kaj ja ne kvazaŭ humilajn ricevantojn de helpo. De ilia deklaro de Tyreso ĝis la posta-generacia manifesto de Prago, ni spertis evoluon for de naiva mond-unueciga idealo al la akcepto de regiona plurismo kaj de ekologia niĉaro kaj ciklaro. Tio estas logika sekvo kaj daŭrigo de la agado de la generacio de Tyreso. La efikon de la laboroj de la generacioj de Tyreso kaj Prago sur la esperantistan konversacion inter konversacioj ni ankoraŭ ne sukcesis vere digesti. La psikologion en Esperantujo regas ankoraŭ la budapeŝta kaj skota skoloj, kiuj malgraŭ persona bonvolemo ne ĝiskapablis akcepti la sudajn voĉojn kiel egalajn partnerojn. Kaj dume, trafis nin la leviĝo de alia maniero konversacii – la interreto! Ni eble komencis pensi, ke ni komencas lerte manipuli la stirilon de monda movado por serioza reedukiĝo al planedana konscio. Sed ĝuste en tiu momento la interreto, kaj ties multkanala interŝanĝado de bildoj, sonoj, kunkroĉe kun dokumentoj, draste malfaris la iaman seriozecon de la edukaj kaj kulturaj sistemoj. En la nuna generacio, la esperantistoj serĉas kulturajn ikonojn ne tiom en libraj tekstoj, kiom sur la kompaktaj diskoj, kie kreiĝas muzika noveco. Bertilo Wennergren estas eble la sola hibrida figuro, same rokmuzika kiel vortarista. Ĝenerale la hodiaŭaj atingantoj devas elekti, ĉu steli sur la distra-amuzindustria ekrano aŭ ĉu fosi la tradician tekstan sulkaron. Nia tradicia esperantista konversacio inter konversacioj alfrontis en sia historio malamikojn potencajn. Sed ni de longe povoscias interveni por antaŭenigi la edukan kaj institucian maldiskriminacion, la sisteman estimon al ĉies homaj rajtoj kaj aliajn ĉiesigajn celojn. La aktuala demando estas, kiamaniere nia stilo kresku por atingi ion similan en la malsistema epoko de tiu ĉi eduk-amuza – ni nomu ĝin la *edmuza* – industrio. Estas nova fenomeno la edmuza industrio, kiun ni ja ne pentru kvazaŭ meduzon. Ne nur ni esperantistoj, sed ankaŭ aliaj kulturaj movadoj komencis fosi novajn sulkojn tiutere. Ne estas nova la ludo de eduka amuzado; nia Claude Piron scipovis verki kaj serioze kaj krimromane, kaj mi ĵus menciis Bertilon Wennergren. Resume dirite: niaj pintaj unuopuloj adaptiĝas kaj jam lerte elpaŝas en generacio post generacio. La esperantista socio devas zorge aŭskulti, spekti, kaj eĉ legi tiujn sukcesulojn kaj ligi ilian kreskadon al nia movada strebado al maldiskriminacia kultura etoso ebliganta la ĉiesan observadon de homaj rajtoj kaj plenumadon de homaj bezonoj sur krizanta planedo. Mi persone pensas, ke urĝe necesas metodo por traduki tiujn unuopulajn atingojn en pli ĝeneralan rekomprenon de niaj laboroj. Tiu rekompreno devos havi radikojn en la pasinteco kaj vivi povajn foliajn flugilojn, kiuj

birdos en novan ĉielon. Tiucele mi proponas al vi, sinjorinoj kaj sinjoroj, uzindan strategion, kiu aperas en la malneta strategia laborplano ekzamenota en la komitataj kunsidoj dum tiu ĉi kongreso. Mi aludas al la Projekto Vizaĝoj. Kion celas tiu projekto? Mia tezo estas, ke vizaĝojn de grandaj atingintoj oni facile rekonas, kaj pere de ili oni komencas pli klare ekkoni la idealojn, kiujn ili evoluigis en siaj ekzemplaj vivoj. La esperantista dialogo kompreneble celas elstarigi ĝuste la plej dialogajn vizaĝojn. Mi jam menciis Sekelj. Anstataŭ skeme paroli pri tiu aŭ alia skolo mi nomu Auld, Kalocsay, Baghy, Urbanova, Montagut, Declerck, en la tradicia, libra kulturo. La oficiala versio de la Projekto Vizaĝoj provizore proponas la produktadon de vikipediaj tekstoj kaj de iuj paperaj dokumentoj kaj libroj sur tiu bazo. Sed ni planas reintertrakti la detalojn de nia malneto dum unu jaro. Ĉu vi ŝatas la ideon, ke niaj rokmuzikaj, filmaj, teatraj steluloj inĝenie kreu plurmodajn artaĵojn por pli efike konatigi niajn vizaĝojn? Kompreneble ĉiu lando devas elstarigi ankaŭ proprajn vizaĝojn. Kaj mi de longe pledas por tio, ke la esperantistoj zorge elektu aliancanojn kaj prezentu ankaŭ iujn neparolantojn de Esperanto kiel pintajn amikojn de, kaj kontribuintojn al, nia universalisma afero. Mi persone sekvos kun granda intereso la decidojn de kubaj esperantistoj pri la vizaĝoj elstarigotaj. La nordo povas lerni de tiu ĉi ikona suda lando i.a. novajn metodojn de mastrumado de organika agrikultura sistemo. Eble iuj esperantistaj verduloj persvados niajn kubajn samideanojn elstarigi la vizaĝojn de iuj organikaj agrikulturistoj, kiuj ne mem lernis Esperanton, sed kies aliancanecon ni povas rikolti? Tio estas nur ekzemplo, pri kiu mi aŭdis. Bonvolu pliklerigi min – kaj nian komitaton – dum la kongreso, kiu nun komenciĝas, geamikoj. Ni venas al kongresoj por *lerni* de vi ĉiuj en kaj ekster la salono. Dankon pro via atento.

/H4 | Havana Karavano n-ro 5/

„Gravaj informoj pri KER-ekzamenoj”

Ni informas la kandidatojn, ke la skriba parto de la KER-ekzameno okazos vendredon, ekde la 11-a horo. C1-nivelo 11h00-16h00 en *salono Jaki...*”

La membraro de la Miŝkolca „Király Lajos” EAR, ĝoje rimarkis la nomdonon :**Jáki** - al la ekzamensalono; familian nomon pri nia kara kaj altestimata ĉijare mortinta profesoro de lingvo Esperanto. **Ni dankas la honordonon.**

Sinjorino Adrienne Pásztor

Novajoj ĉe la UK en Kubo

- Kiel unu el siaj lastaj decidoj la foriranta estraro de UEA decidis organizi konkurson pri redaktora posteno de la revuo Esperanto de UEA. Kompreneble la konkurson rajtas partopreni ankaŭ la ĝisnuna redaktoro.

- La Universala Kongreso en Havano komenciĝis sabate per kunsido de la komitato de UEA, dum kiu estis elektita la nova estraro de la asocio. La elekto okazis laŭ la propono de la elekta komisiono, kaj nomoj de alternativaj kandidatoj ne troviĝis en la voĉdonilo.

Probal Dasgupta estis reelektita kiel prezidanto de UEA.

- La ĉiutaga kongresa gazeto "La Havana Karavano" estis legebla ankaŭ en la reto, ĉe http://uea.org/kongresoj/uk_2010.html

/Retpoŝta novaĵservo kun selektitaj E-novaĵoj, RET-INFO: <http://www.eventoj.hu/>

Unu homo, unu libro, unu horo

Unu homo: prof. Lee Chong-Yeong, en Esperantujo konata simple kiel Chong. Unu libro: *Lee Chong-Yeong, gvidanto nia*, eldonita de Korea Esperanto-Asocio. Unu horo: la tempo kiun ni pasigos kune en la libroservo por omaĝi al prezidinto de UEA, konante lin pli bone per la vortoj de tiuj kiuj plej intime kunlaboris kun li kaj/aŭ kiuj plu antaŭenigas liajn ideojn: Probal Dasgupta, Humphrey Tonkin kaj aliaj. Do venu ĉiuj al la libroservo dimanĉon la 18-an de julio, je 16h15.

Michela Lipari, KN 411

La bona lingvo ankoraŭ pli bona

Dimanĉon ja la 13-a horo en salono Canuto (Kanuto) kunvenos la nova asocio Tutmonda Esperanto. La kunveno estas malfermita al tiuj, kiuj kredas, ke Esperanto estas regula kaj sen esceptoj, kaj devas resti tia.

Renato Corsetti, KN 412

Kiel agi en esperantistaj dezertoj

Renato Corsetti, HORI Jasuo, Martin Schaffer

Ekzistas ankoraŭ multaj landoj en la mondo, kie eĉ unu esperantisto ne ekzistas. Do, la problemoj estas kiel krei esperantistojn tie, kiel verdigi la dezerton. Unu el la sistemoj estas tiu elprovata de la Azia Komisiono (KAEM), sed ankaŭ de aliaj kontinentaj komisionoj de UEA, sendi homon al la lando, kiu gvidu la unuajn Esperanto-kursojn. Oni povas pensi pri alternativaj metodoj, ekzemple anoncoj en lokaj ĵurnaloj, anoncoj pri retaj kursoj. Ĝenerala demando: kiu estas la preferinda metodo por naski Esperanto-movadon en nova lando?

Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko

Humphrey Tonkin

Dum la kongresa semajno, okazos laborkunsido pri la agado de UEA ĉe UN kaj Unesko, sed la celo de la nuna sesio estos iom pli vasta. Ĝi respondos du demandojn: "Kial gravas, ke mi sciu pri UN kaj Unesko kaj subtenu ilin?" kaj "Kion mi povas fari por antaŭenigi Esperanton en tiaj internaciaj medioj?" Membroj de la teamoj, kiuj reprezentas Esperanton en Novjorko, Ĝenevo, Vieno kaj Parizo prezentos siajn vidpunktojn kaj diskutigos vin.

// http://uea.org/kongresoj/uk_2010.html /Havana Karavano N-ro
[1/](#)

Salutmesaĝo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof

*Sinjoro alta protektanto, sinjoro prezidanto, gesinjoroj honoraj gastoj, estimataj
gekongresanoj,
geamikoj karaj*

Saluton al vi, alvenintaj de landoj malproksimaj al la gastama urbo de Havano, alvenintaj por diskuti kaj, sekve, por progresigi la interproksimigon de kulturoj.

Bonvolu aŭskulti ĉi tie kelkajn vortojn de maljuna nepo de Avo eterne juna, Avo kiu nian belan lingvon iniciatis ĝuste por kulturojn interproksimigi. Lingvo ja estas vehiklo de kulturo. Tial, laŭ onidira observo de Ludoviko gapvaganta sur la Bjalistoka vendoplaco, malamikeco ekzistis inter malsamlingvanoj sin reciproke ne komprenantaj; malamikeco kaj malkompreno bremsantaj interproksimigon de respektivaj kulturoj de tiuj malsamlingvanoj.

Kontraŭe al la iama Bjalistoka vendoplaco, nia Kongreso Universala estas teatro de kultura interproksimigo kaj ni, esperantistoj, ni de tiu interproksimigo estas la aktoroj. Ne nur pro malekzisto inter ni de lingvaj baroj, sed ankaŭ pro la neŭtraleco de nia lingvo Esperanto, dua lingvo por ĉiuj neniel celante ian ajn nacian lingvon anstataŭigi.

Mi forte deziras, kiel vi ĉiuj, ke la Havana Kongreso estu signifa paŝo sur la vojo de kultura interproksimigo.

Noto de UEA-estrarano HORI Jasuo: “Estis mia granda honoro ke oni donis al mi la taskon anstataŭlegi la mesaĝon de Zaleski-Zamenhof. Komence de tiu ĉi jaro mi decidis tralegi la serion de Plena Verkaro de Zamenhof (PVZ), kompilitan de s-ro Ito Kanzi kaj konsistantan el 54 volumoj. Preskaŭ ĉiun tagon mi legas kaj legas PVZ-on kaj nun mi legas la 7-an volumon. Mi aĉetis tiun serion jam antaŭ pli ol dek jaroj, sed la serio silente sidis en mia ŝranko. Mi jam estas 68, kaj la morto pli kaj pli proksimiĝas. Kiam mi iros al la ĉielo kaj renkontos d-ro Zamenhof kaj s-ron Ito, kion ili diros al mi? Eble ili diros: ‘Vi diras ke vi estas esperantisto, do kial vi ne legis la serion de PVZ?’ Mi hontos tion, kaj decidis lukti kontraŭ tiu ampleksa serio. Kiam oni nomumis min kiel anstataŭleganton de tiu ĉi mesaĝon, mi sentis kvazaŭ d-ro Zamenhof kaj s-ro Ito kuraĝigus min pri mia decido. Mi praktikis la legadon por ke ĝi sonu bele kaj impresu. Ĉu mi sukcesis?”

Lerni ludante

Centoj da kongresanoj ĉe la prelego de Ana Montesinos (KN 647) en la Kleriga Lundo lernis serioze, sed ridante, manierojn por faciligi la lernadon de Esperanto per diversaj ludoj, inkluzive de loterio. Partopreno estis centprocenta, kun absolute ĉiuj en salono Broccatelli farante ion dum la klaso. La montrata luda metodo ankaŭ pruvis, ke instruistoj ne bezonas uzi gepatran lingvon de la gelernantoj por igi ilin lerni. Ekzemple, mi porĉiame lernis la vorton *krabo* per tiabesta premio, kaj *karamelo* per premiita ekzemplero de tio, pro mia ĝusta respondo “akvomelono” al prezentita demando. Nia prelegantino bone montris sian instruan lertecon kaj bonhumo. Dankon Ana!

Jose Luis Montes de Oca, KN 902

Rezultoj de Belartaj Konkursoj 2010

POEZIO

Dua premio: por “Antaŭ via foriro” al Josip Pleadin, Kroatio. **Tria premio:** por “Ekzistas ie kaŝita loko” al Josip Pleadin, Kroatio.

PROZO

Unua premio: por “En katedralo” al Edmund Grimley Evans, Britio. **Dua premio:** por “Verda ondado” al Sten Johanson, Svedio. **Tria premio:** por “La deturniĝo” al Luiza Carol, Israelo. **Honora mencio:** por “Rulseĝo” al Paulo Sergio Viana, Brazilo.

TEATRO

Tria premio: por “Kiu kaĉon aranĝas, tiu ĝin manĝas” al Lena Karpunina, Rusio.

Honora mencio: por “Kroka paradizo” al Stefan MacGill, Hungario. **Honora mencio:** por “Princino Seka Diazbeti” al Adrienne Pasztor, Hungario.

ESEO

Unua premio: por “Vortfarado kaj radikfarado” al Christian Riviere, Francio. **Dua premio:** por “L’espero, l’obstino kaj la pacienco” al Doron Modan, Israelo. **Tria premio:** por “La literatura vivigo de Esperanto” al Paulo Sergio Viana, Brazilo.

INFANLIBRO DE LA JARO

“Reĝo Maĉjo la Unua” eldonita de Tomasz Chmielik, Pollando.

KANTO

Unua premio: por “Senlimiĝis” al Duoble Unu. **Dua premio:** por “Surplacen venu vi” al Kaj Tiel Plu.

FILMO

Ankoraŭ ne anoncite.

// http://uea.org/kongresoj/uk_2010.html /Havana Karavano N-ro 5/

Korekto

koncerne la komunikojn de Rezultoj de Belartaj Konkursoj de UEA

Mi informas la eldonantojn de gazeto Karavano, la redaktoron de Libera Folio kaj la legantojn de nia retrevuo, ke PRINCINO ŜEKA DIZABETI estas la ĝusta titolo de teatraĵo verkita de sinjorino Adrienne Pásztor, kiu estis premiita de la Belartaj Konkursoj de UEA, per „Honora Mencio”. En komunikoj de UEA kaj de Libera Folio, la titolo de verko estas misskribita.

Mi gratulas al ĉiu premiito:

Sinjorino Adrienne Pásztor, Miskolc

Oratora Konkurso

Malgraŭ la frua horo (el junulara vidpunkto), ses junuloj venis por elprovi sian retorikan talenton en la ĉi-jara Oratora Konkurso. Ĉiuj partoprenantoj havis taŭgan lingvonivelon, kaj valoros, ke ili daŭre klopodu plispertigi kaj plilertiĝi pri parolado antaŭ publiko.

La unuan premion ricevis Rogier Huurman (KN 181) el Nederlando, parolante pri la temo “Ĉu la homo povas influi la naturajn fenomenojn?”

La dua premio iris al KIM Young-Long el Korea Respubliko, kiu traktis la temon “Kiel povas roli Esperanto en la interproksimigo de kulturoj”. **La ĵurio ankaŭ atribuis honoran mencion** al Alexandre Serafim el Brazilo, kiu traktis la saman temon kiel la gajninto de la unua premio.

Claude Nourmont, KN 70

Aŭtora Duonhor

Membroj de la Miŝkolca „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo gratulas al sinprezento de la verkistoj dum „Aŭtoraj Duonhoroj” de la la 95a UK en Havano, Kubo:

S-ro Humphrey Tonkin, s-rino Anna Löwenstein, s-ro d-ro Amri Wandel, s-ro Geoffrey Sutton, s-ro Stano Marček, s-ro Josias Ferreira Barbosa, sinjoro Eddy Raats. Pardonu min se iun mi forgesis mencii ĉi tie.

Sinjorino Adri Pásztor, laŭ elsendoj de Radio Havano, Kubo

Rezolucio de la 95-a Universala Kongreso de Esperanto

La 95-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninta en Havano (Kubo) kun 1002 partoprenantoj el 59 landoj,

konsiderante, ke Unuiĝintaj Nacioj deklaris la jaron 2010 jaro de interproksimigo de kulturoj,

konstatas

– ke la diverseco de kulturoj en la mondo grave kontribuas al la riĉeco de la homaro,

– ke jam dum 123 jaroj Esperanto kiel neŭtrala lingvo helpas konstrui pontojn inter popoloj kaj kulturoj, kaj

– ke la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kunigante homojn el plej diversaj landoj tra la mondo, mem atestas tiun kapablon konstrui pontojn,

deklaras la deziron de Esperanto-parolantoj kunagi kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko por stimuli komprenemon inter popoloj kaj samtempe protekti la identecon de ĉiuj homgrupoj, kaj

invitas Unuiĝintajn Naciojn kaj Uneskon plene eluzi siajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio por plej efike realigi siajn celojn.

/Havana Karavano-N-ro.../

Aldone al la mallongaj notoj en la Kongresa Kuriero

Aldone al la mallongaj notoj en la Kongresa Kuriero, mi diru la jenon:

- La kunveno okazis en plenplena salono tre entuziasmiga;

- Cvi Solt parolis pri la vortofarado en la nov-hebrea kaj per kelkaj ekzemploj montris la ekspluatadon de la internaj rimedoj fare de la nov-hebra. Pro tempomanko li ne povis fini la intenciatan paroladon.

- Jose⁷ Antonio prezentis brilan prelegon pri la vortomaterialo en pluraj projektoj de internacia lingvo kaj analizis ilin surbaze de principoj de internacieco de Verloren Van

Themaat. Li projekciis belajn bildojn, kiujn ni verŝajne malfacile povas meti en la paĝaron, sed eble li volos mem sendi tiun materialon ligita al mesaĝo en la listo 'la bona lingvo'.

- Josias Barboza fine dankis nian grupon sed tute aparte Marcos Cramer pro la detala korektado de la lernolibro eldonita de Josias.

Apenaŭ estis tempo por kelkaj demandoj.

Interesiĝantoj ricevis centojn da informiloj dum la movada foiro kaj 10 ekzemplerojn de la "libro" La Malbona Lingvo, kiu fakte estas elpresaĵoj de la enhavo de niaj listoj. La laboro de nia grupo komencas esti pli kaj pli konata.

Renato Corsetti

Listo „la bona lingvo”

La listo de la reviziantoj estas videbla en

<http://www.uea.org/vikio/Reviziantoj>

Por ŝanĝi vian abonajn agordojn, vizitu:

<http://groups.yahoo.com/group/la-bona-teksto>

Por malaboni, vi povas sendi retroŝton al:

la-bona-teksto-unsubscribe@yahoogroups.com

Gratulo

Membroj de la Miŝkolca „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo gratulas Vin UEA, la Esperanto Radion en Havano kaj geesperantistojn de Kubo, pro la tre sukcesa aranĝo de la 95-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano, Kubo. Ni deziras plian entuziasmon, animforton kaj bonajn kunlaborantojn.

Estimplene: Geedzoj Pásztor el Miskolc, Hungarujo

15. Jaras la Societo de Tokaj-montosubaj Kreantoj / HAT/

La Asocio de la Tokajmontosubaj Kreantoj fondiĝis la 15-an de decembro 1995 en urbo Szolnok /Solnok/ kadre de libroprezentado de nia kreantokunulo, Andreo Újfalusy Tóth. Tiu libroprezentado estis aranĝita post la renkontiĝo de la verkistoj en aŭgusto de 1995 en Eger. La Asocio havis 10 membrojn je ĝia fondiĝo. La Asocio plenumis sonĝojn de malmulte „aliel pensantaj” kreantoj. Post la „intenco-deklaro” okazis la tribunala registro de la Asocio en aprilo de 1996, laŭ la fonda dokumento, signante kiel rezidejo la urbon Szerencs. La celoj, aktivecoj, taskoj legeblas en la statuto sekvemaniere: „Apogoj kaj popularigoj de la hungara literaturo kaj aliaj kreantaj artaj aktivecoj, helpoj pri estigo de novaj valoroj. Oni devas certigi parolajn kaj skribajn eblecojn por la kreantaj artistoj. Oni devas fari fakan reprezentadon de interesoj de la membroj. Oni devas iniciati financon kaj moralan helpon de la literaturaj artospecoj, libroeldono kaj estigon de metiejo de kreistoj. Elstara celo de la Asocio estas prizorgi naciajn valorojn, transigon de la hungara kulturo kaj servi por evoluo de la socio.

Membroj de la Asocio de la Tokajmontosubaj Kreantoj estas komunumo de sentemaj homoj strebantaj, je beleco, boneco, kiuj estas artistanimoj, kaj verkas ne profesie, ne esperante financon, aŭ moralan profiton, sed plezurigu sin mem kaj la legantojn de sia pli malvasta

ĉirkaŭaĵo. Pro tio iliajn nomojn kaj verkojn ne multe da homoj konas, kvankam kelkaj verkoj povas esti sukcesaj estetike.....Do, grandparto de la verkistoj skribas ne pro la sukceso kaj financa profito de siaj poemoj, eseoj, rakontoj, noveloj. Ili ne deziras rajdi sen selo sur imagaj flugiloj havanta ĉevalo Pegaso de la poeta famo, kiu povus levi ilin al pinto de la senmorteco, je Parnaso. Ili sopiras, ke la domaĝite garditaj ĉielarko-kantoj de ilia animo post pli mallonga-plilonga meditado naskiĝu kaj ĉefe tiuj homoj aŭdu plej unue, por kiuj estis skribitaj, ĉar tiuj-ĉi kantoj de animo al animo povas doni pli da signifo por ili.

La unua vorto de la hungarlingva nomo de Asocio de la Tokajmontosubaj Verkantoj signifas ne nur geografian nocion. La vorto „monto” esprimas la reprezentadon de la montosuba mondo. Ĉi tiu esprimo devenas el la stratobruo, labortagoj, stratetaĉoj, sociaj arbustaroj kaj kampovojoj. Kaj vere: iliaj kuraĝaj, malkuraĝaj, singultantaj, kelkfoje per lambastono iranta, lametantaj elokvantaj vortoj estas partoj de la tutmonda progreso. Ankaŭ ilia voĉo apartenas al tiu frazo, kiu estas grava en la nuna socio, ĉar ni devas gardi nian homecon kontraŭ la malĝentileco, la egoismo kaj la obstaklado.....”

Ni kredas, ke ni estas partoj de la tutlanda progreso kaj ĉiam pli kaj pli oni konas nin en la plej diversaj landaj kaj lokaj verkistaj komunumoj; helpe de la nun jam sisteme aperanta antologio, helpe de la publikviva gazeto Szerencsi hirek / Informoj de Szerencs/ kaj helpe de la Interreto. Verkoj de Asocio de Tokajmontosubaj Verkantoj kaj priskribaĵojn de aliaj verkistoj povis legi unue la civitanoj de urbo Szerencs en la gazeto Informoj de Szerencs en marto de 1996. Ni prezentis nin unue en 1996 sume en kvar kazoj sur ok paĝoj /A/3/. Dum la pasintaj 14-15 jaroj pli ol 220 geverkistoj prezentis siajn verkojn kaj ĉirkaŭe 1400 verkojn oni povis koni. Ĉi tiuj redaktistoj – unue Mikelo Lindák, fondinta prezidanto, ekde 2003, D-ro Ernesto Gaál, reganta prezidanto - kompilis laŭ la en statuto fiksitaj vidpunktoj. Laŭ ĉi tiuj vidpunktoj ne nur membroj de la Asocio ricevis eblecon „por prezentiĝi”, sed ankaŭ niaj aliaj kreantaj komunumoj apartenantaj kaj verkantaj amikoj el? Pécs, Komló, Oroszlány, Pápa, Lábod, Budapeŝto, Ózd, Debrecen, regiono de Zemplén kaj departemento Békés.

/ Ni povas diri, ke ni estas feliĉaj, ĉar ĉiama urbestro kaj deputitaro de la urbo Szerencs donis eblecon por prezento sur paĝoj de la loka organo senpage kaj subtenis, subtenas ankaŭ nun kaj finance kaj morale subtenas mallongtempajn, kaj longtempajn planojn, klopodojn de la Asocio./

Etoso de la menciitaj pensoj „inspiris” ankaŭ titolelekton de niaj unua, dua, tria antologio:

- „Ĉi tie ni iras inter vi” /1997/, - Sur senvoja vojo” /1998/,

- „Antaŭ malfermitaj pordegoj” /2003/

Nia antologio titolita „Ĉieldirektoj” /2007/ jam transpasas kadrojn de la tradicia antologio. Apud lirika kaj proza verko ankaŭ vojpriskriboj, raportoj el tri kontinentoj kolorigas paĝojn de nia eldonaĵo. Nov Jorko, Tajlando, Parizo, Transilvanio, regiono de Ĉangó. La Asocio iĝis ankaŭ lande konata malprofita kultura asocio inter jaroj 1996-2001. Dank’ al la interrilatoj kun la aliaj samaj asocioj kaj komunaj programoj. Inter tiuj ĉi ni devas menci i unue la sekvajn asociojn: SZIRT de Karincbarcika, Budapeŝtan kaj regionajn AKIOSZ-Asociojn kaj amikajn kreantajn grupojn de Interreta Asocio de Hungaraj kreantoj/MAIT/, MAME de Mezökövesd, ZAKO de Sátoraljauhely, Artistgrupo de Cserhát, kaj Budapeŝtajn Fajrobrigadanojn. Nia unua pli grava prezentiĝo okazis antaŭ la publiko en novembro de 1996, laŭ iu gajnita konkurso en Banana klubo Budapeŝto. Sed ni reprezentigis nin i.a. en la Parlamento dum landa konferenco aranĝita por civilaj movadoj /aprilo 1997/ kaj ankaŭ dum ceteraj aranĝoj, ekz. tiu de Eŭropa Tago, Expo kaj Kazinczy-klubo de Miskolc. Ĉiujare ni anoncis literaturajn konkursojn por niaj membroj kaj por ĉiuj interesantoj. Helpe de tiuj ĉi konkursoj – kiujn ni honorariis – ni deziras kolorigi nian agadon, kiu kontribuis al niaj mallong-, kaj longtempaj planoj, celoj. Ni aranĝis nian unuan kreantarejon en la aŭgusto je la 1996 trans la departementlimo: en Monorierdő, sed poste ni revenis al departemento Borsod-Abauj-Zemplén: en Dédestapolcsány, Nagybózsza kaj Dubicsány. En la pasintaj kvin jaroj vilaĝo

Tarcal donis hejmon por niaj kreantaj metiejoj. Ni konkursis sukcese pri la Mecenato-fondaĵo en 2010 kaj el la konkurspremioj ni deziras prezenti kaj heredigi por posteularo elektitajn verkojn kaj belartajn verkojn. La Asocio subtenis tiujn verkantojn, kiuj siajn verkojn aranĝis en volumon. / M.Lindák, I.Kardos, E. Bodnár, E. Gaál, I.Leskó, T. Németh, E.Tóth, R.Kovács, Babrielo Bari, E. Maczkó, A.Jeney, A.Gál Halász, I.Nagy, ktp.

Nun jam tradicie ni aranĝas nian jaran kutiman jarkunsidon aŭ antaŭtagon de la poezio, aŭ post tiu, dume membraro de la Asocio pritaksas la antaŭan jaran laboron kaj decidas celojn, taskojn de la aktuala jaro. Po 5 jaroj okazas estrarelekto, ne kalkulante pri la eksterordinarajn situaciojn. La jarkunsido okaze de tio elektas tritagan estraron, tritagan kontrolkomisionon kaj ekde 2001 kasiston de la Asocio. Nia membrotitolo estas de 1996 senŝanĝa: por gepensiuoloj estas 1200 forintoj kaj por gelaboruloj estas 2500 forintoj.

Dum la pasintaj pli ol 14 jaroj nia asocio havis multe da sukcesoj, sed ni povas diri sen troigo, ke la festivalo „HAT ÉVE HATUNK” en la Szerencs en la 16-17-a decembro 2001 / De ses jaroj agas nia HAT/ ĝis nun estis la plej sukcesa kaj plej memorinda okazintaĵo. Same kiel aranĝo, nomita „naskiĝtaga partio”, estis pli sukcesa, ol oni atendis, dank’ al la trimonata organiza streĉita laboro, pri tia sukceso la du ĉeforganizantoj (Ernesto Gaál kaj M.B.I.) esperis nur en iliaj plej belaj songoj. La mon- kaj objektodonacoj ricevitaj de Urbeŝtaro de Szerencs, ĝiaj Institutoj, kaj entreprenistoj de ĉirkaŭaĵo de Szerencs, per la granda ovacio akompanataj prelegoj de la ankaŭ tutlande rekonataj kaj larĝe konataj elstaraj aktorinoj: Kamilla Dévay Nagy, kaj Suzana Mary estis la garantio, la certeco al la bonfarto, sinforĝesa amuziĝo de la ĉ. 200 membra kreanta, literaturon protektanta publiko vizitanta tien, el la plej foraj regionoj de la lando. Paŭze de la dancamuzo oni aranĝis lotumon de tombolo, el multe da valoraj objektoj kiujn posedantoj de tombol-biletoj transprenis, danke de entreprenantoj. Ankaŭ la departementaj kaj lokaj organoj de la komunikado informis pri la preparadoj kaj la aranĝo. Multe da dankoj kaj rekonaj leteroj pruvas, ne troigante, ke Szerencs iĝis dum 2 tagoj „kultura ĉefurbo” de Hungarujo. La dekjara naskiĝtago de HAT estis festita je la 16-a de decembro 2005 pli modeste, sed la etoso estis familieca, elkora kaj amika.

Mi priskribis en mia kompilo pri 15. jaroj HAT. Eble, ke ne videblas la detaloj. Sed mia celo ne estas la erarigo! Mi nur kuraĝis antaŭen konigi la 15. jaron. Mi faris tiel, kiel la adoleskantoj, kiuj montras sin pli aĝaj, ol fakte estas, ĉar eblos pli alloga por la sopirantaj viroj....- Eble, ke mi ne troigas, se mi diras: La Asocio de la Montosubaj kreantoj iĝos plenaĝa ĉijare en decembro. Ni jam transvivis neeviteblajn „infanmalsanojn”, la puberecon. Kvankam nia plenaĝo ne promesas senzorgan futuron, ni volas pluiradi sur la elektita vojo memvole. Ni volas resti utilaj membroj de la lando progresanta: anoj de grandfamilio de la malprofitaj kulturaj asocioj, de la civilmovado. Nia celo estas ankaŭ en la futuro prizorgadi, heredigi la naciajn valorojn de la hungara kulturo kaj por servi evoluon de la socio.

Szerencs, la 04-an de junio 2010-a

Maklári Bódi István fondinta membro
Rememoron de István Bódi Maklári, esperantigis László Pásztor

Barko de Noa

Ĉion, kion vi devas scii en la vivo, tion instruas al vi Barko de Noa.

1. Ne malfruiĝu al la ŝipon.
2. Rememoru pri tio, ke ni ĉiuj estas en la sama ŝipo.
3. Planu antaŭen, ĉar ankaŭ tiam ne pluvis, kiam Noa konstruis sian Barkon.
4. Havu bonan korpostaton, ĉar eblas tio, ke iu petos vin por unu grava afero en via okdeka jaraĝo.

5. Ne zorgu pri la kritiko, faru tiun laboron, kiun devas fari.
6. Plani sian estonton altnivele.
7. Tenu antaŭ okuloj ĉiam la gravecon de geedziĝo.
8. La rapido ne ĉiam gravas. Kaj la heliko kaj la pantero estas en la sama ŝipo.
9. Se vi havas streson, tiam lozu.
10. Rememoru: La Barkon konstruis amatoro, sed la Titanic-on profesiuloj!

/La tekston – senditan de: s-rino Helena Böde - esperantigis: László Pásztor/

Ŝercoj

Lavistinoj

Du maljunaj fraŭloj paroladas.

- Mia lavistino estas terura sinjorino. Ŝi reportas la ĉemizojn sen butonoj post la lavado.
- La mia estas pli terura, ol la via. – parolas la alia. – Tiu reportas la butonojn sen ĉemizoj, post la lavado.

La edzo

Iu aĉetanto iras en la modobutikon kaj petas ĉemizon numeo 41 kaj piĝamon numero 38.

- Ĉu ambaŭ estos por vi mem? – demandas la vendisto mirante.
- Jes, por mi mem.
- Kial vi petas pli malgrandan piĝamon, ol ĉemizon?
- Ĉu vi scias kiel „malgranda” mi estas hejme?

Al ĉiuj, kiuj jam estas sufiĉdelonge junaj

Iu sinjoro maljunulo decidis por iri al nacia parko en Afriko. Li kunportis sian oldan hundon, por havi societon. La hundo iutage peladis la papiliojn kaj subite rimarkis, ke vojeraris. Ĝi iradis tien kaj reen por ek trovi la ĝustan vojon. Subite ĝi rimarkis, ke unu leopardo rapidegas al ĝi por manĝi ĝin.

La olda hundo pensis: „Ho, ve! Mi estas vere en malbono!” Dume ĝi rimarkas en la proksimo kelkajn ostorestaĵojn devenanta el iu bestkadavro. Ĝi komencis maĉi la ostojn turnante dorson al la proksimanta leopardo. Kiam la leopardo jam preskaŭ sursaltas, la olda hundo ekkriis: Ĉi tiu leopardo vere estis tre bongusta! Ĉu mi trovos ankoraŭ unun?”

Aŭdante tion la leopardo, lastmomente malrapidigis la salton terurante rigardis la oldan hundon kaj eskapas. „Ho, ve! – flustris la leopardo - ĉi tio estis danĝera situacio. Tiu hundo preskaŭ kaptis min.

Dume iu olda simio, kiu rigardis la tutan scenon sidante sur iu arbobranĉo, pensis, ke povas havi utilon el la vidindaĵo kaj marĉandi defendon de la leopardo. La simio kuraĝis kuri post la leopardo, sed la olda hundo, vidante la simion kurantan post la leopardo, divenis ruzecon de la simio. La simio atingis la leopardon, malkovris artifikon de la hundo kaj proponis marĉandon.

La juna leopardo furioziĝis, pro superruzi lin: „Venu ĉi tien, simio, saltu sur mian dorson, kaj vi vidos, kia estos ties sorto, kiu volas superruzi!”

La olda hundo vidis alkurantantan leopardon kun la simio surdorse kaj maltrankviliĝis: „Nu, kion mi faru nun?” Sed anstataŭ eskapo ĝi denove sidiĝis, dorson turnante al la atakantoj kaj faris, kvazaŭ ĝi ne vidintus ilin. Kiam ili atingis je aŭd-atingo, ĝi ekkriis: „Kie estas jam tiu idiota simio? Mi sendis ĝin jam antaŭ unu horo por porti alian leopardon!”

Instruaĵo:

- Neniam priridu la maljunulojn!
- La aĝo kaj artifiko ĉiam venkas la forton kaj junecon. La spirito kaj ruzeco pliiĝas de la aĝo kaj sperto.

/La hungarlingvan tekston senditan de s-ino Maria Ballán, esperantigis László Pásztor/

11.07.Mondotago pri la Naskiĝokvanto

En 1968, la UNO envicigis la familioplanadon al Homaj-rajtoj. La superkresko de loĝantaro apartenas al la unua grada plej granda morta peko de la homaro – asertas s-ro Konrad Lorenz, Nobel-premiita esploristo pri konduto, kiu en sia fama libro – La ok mortecaj pekoj de la homaro – atentigas pri la sekvoj de superkresko de la loĝantaro, pri la plimultiĝanta agresemeco. La 11a de Julio estas: Mondotago de loĝantarkvanto. La UNO tial elektis tiun ĉi tagon, ĉar laŭ la tiamaj kalkuloj, la loĝantaro de Tero atingus kvin miliardojn je la 11a de Julio 1987a. Atendeble tiuĉi nombro jam povos duobliĝi je 2050.

(Laŭ la Hungara Vikipedio: s-ino Adri Pásztor)

26.07.Tago de la Internacia Lingvo

Ĉi tage la lingvon Esperanton uzantoj rememoras kiel la internacian lingvon.

Kion mi povas danki al Esperanto?

Spertoj kaj pensoj pri la internacia lingvo

La plimulto de la homaro kaj ankaŭ mi mem jam en mia infaneco renkontis fremdajn lingvojn. Mi demandis: Kial la homaro ne parolas per sola lingvo?

Tio estas praa demando. Jam la Biblio provas respondi la demandon. Pensu pri la legendo de la turo de Babelo.

Aliflanke mi memoras iun malnovan proverbon: En unueco estas la forto. Aŭ: Unueco estas la forto.

Do, la unua rekono estas: La homaro pretendas iun komunan lingvon, per kiu ĉiuj komprenas ĉiujn.

Mi trovis tian lingvon! Ĝi estas Esperanto! Prisorĉis min ĝia logiko kaj facileco en la lernado.

Mi povas danki al Esperanto, ke mi ekkonis la faman profesoron kaj pedagogon, sinjoron Florian Bociort el Timisoara, eminentan esperantiston. La jaroj pasis kaj inter la esperantistoj mi ekkonis multajn elstarulojn kaj mi trovis ankaŭ kelkajn verajn amikojn.

La dua rekono: La lingvo-studado trejnus la cerbon daŭrigas ĝian freŝon, kiel la sporto kaj movo la homan korpon. Sed ĉiujn lingvojn neniu povas ellerni. Krom Esperanto mi parolas la hungaran, la rumanan kaj la anglan. Mi lernis ankaŭ la rusan, la francan, kaj germanan. Do, mi havas la bazon por kompari Esperanton kun aliaj lingvoj.

En la sekvantaj linioj mi priskribas niajn spertojn kaj pensojn, kiuj dum la pasintaj jaroj kristaliĝis en mi.

Esperanton mi komparas kun la fama Rozeta-ŝtono. Tiu estas simbolo por pontolingvo, solvilo inter malsamaj komunikistoj. Preskaŭ el ĉiuj lingvoj kaj kulturoj de la Tero oni tradukis kaj tradukas daŭre en Esperanton. Se meritis savi ion el nia provizora epoko al la futuro, tio ĉi estu Esperanto.

Vizitante la faman bibliotekon de **Karlo Fajsi** en Budapeŝto, mi opinias, ke tiu biblioteko /kaj ne nur tiu/ estas vera Rozeta ŝtono. Mi rememoras la vortojn de Zamenhof mem: „Floros la Biblioteko, floros ĉio, falos la Biblioteko, falos ĉio.”

Per Esperanto oni povas ekkoni realaĵojn, diversaĵojn, al kiuj la anglosaksa kulturo ne tre atentis. Sinjoro Fajsi malkovris metodon por akiri librojn. Kiam iu maljuna esperantisto mortas, kaj la vidvino kaj la gefiloj ofte ne estas esperantistoj kaj ne havas intereson pri ties libroj lia metodo estis: ĉi kaze por taksu la heredaĵon kaj proponi konvenan prezon ne nur por la elektitaj libroj, sed por la tuto. Tiel li ĝuste traktis kun la heredantoj kaj samtempe akiris la deziratajn librojn kaj ankaŭ duoblaĵojn por interŝanĝo.

La nunaj mondlingvoj disvastiĝis ne surbaze de iliaj perfektecoj, sed per politika perforto /violento, agresivo, brutala forto/ kiel la latina, hispana, portugala, franca kaj angla lingvoj. Kaj jen estas la paralelo: La kristanismo kiel monoteismo kontraŭ la estinta kaj dominanta plurteismo en antikva Romio disvastiĝis malgraŭ la perforto de la potenculoj. Laŭ mia opinio same disvastiĝos Esperanto, kiel la kristanismo.

Oni kritikis Esperanton /vi scias, ke ne nur Esperanton./ Tamen laŭ praa saĝeco oni devas aŭskulti eĉ aliajn opiniojn. Do, rigardu kelkajn kritikojn kaj kelkajn kontraŭargumentojn:

1. a. Esperanton lernas precipe tiuj personoj, kiuj ne kapablas ellerni fremdan lingvon krom sia gepatra.

1.b. Esperanto fakte estas ellernebla multe pli facile, rapide kaj malmultekoste, ol la naturaj lingvoj. Pro tio ĝi estas speciale ĝusta por tiuj, kiuj /pro variaj kialoj/ malfacile alproprigas fremdajn lingvojn. Ĝi estas eĉ pli facila por tiuj, kiuj jam parolas alian eŭropan, ĉefe novlatinan lingvon.

2.a. Se Esperanto ĝeneraliĝos, multaj parolantoj malbonigos ĝin.

2.b. Ĉar Esperanto estos la dua lingvo por ĉiuj, neniu fuŝos, malbonigos ĝin, ĉar ĵargonon ĉiuj kreas nur en siaj medioj, fakoj. Ĉar la celo de la dua lingvo estas, ke ĉiuj komprenu ĝin, superfluus por krei deviojn.

3.a. Esperanto disiĝos al dialektoj.

3.b. La dialektoj aperas en geografie izolitaj regionoj. La nuntempaj komunikiloj, kiel televido, radio, reto, helpas la literaturan ĝustan Esperanton.

4.a. Aperos diversaj stiloj en Esperanto.

4.b. Ĉiuj verkistoj havas propran stilon eĉ en la naturaj lingvoj. La stilo, kiu povas esti kolora, malkolora, pura, malpura, komprenebla aŭ malkomprenebla, profunda, ktp. apartenas al la uzantoj kaj ne al la lingvo.

5.a. La ĉapelitaj literoj povos embarasi, konfuzi la uzantojn.

5.b. Ĉiuj lingvoj uzas litero-kombinaĵojn. En la reto la ĉapelitaj literoj estas anstataŭigitaj per la kombino de signo **xo**, aŭ litero **ho** kaj ĉiuj uzantoj povas kompreni ilin.

Konkludo: Perfekta lingvo ne ekzistas, ankaŭ la naturaj lingvoj ŝanĝiĝas, progresas,, same ankaŭ la internacia lingvo.

Ĉiookaze mi preparis kaj prezentis konversaciajn temojn, recenzojn por Esperanto Asocio de Oradea, kiuj pligrandigis ne nur mian vorttrezoron, sed ankaŭ mian ĝeneralan klarecon. Mi vicigas kelkajn temojn:

1. Interesaj ekskursoj.

2. Fungoj/kefiro de Tibeto-la akva kefiro/, japana kristalo,, trinkaĵo de Kombuĉo.

3. Enkonduko en la orientan diagnozon. / Ni povas konkludi: la ekstera aspekto estas eĥo de nia interna stato./

4. La mankanta ĉenero: la akva simio? / nova koncepto de **s-ro Alister Hardy**./

5. Kio bezonatas al la bona geedzeco? / kelkaj pensoj pri ĝi: la geedzeco estu pli feliĉa, pli bezonas harmonio de la karakteroj, ol la harmonio de la pensoj. Pro tio du malakordaj kordoj donas falsan voĉon, kiel ankaŭ en geedzeco, se la moralo de geedzoj malakordas. Bezonas, ke la geedzoj klopodu por transformi sian loĝlokon al hejmo.. /

6. Ĉu oni bezonas Esperanton?

Recenzoj pri libroj:

1. Vilaĝano el Poltava. / Ukrajna popola rakonto el la lernolibro de **Edmond Privat**.

2. Parizaj paroladoj de **Abdul Baha**. En la enkonduko ni ricevas mallongan skizon pri Bahaismo.

3. „Eszperantó világnyelv” – verketo de **Ábel Barabás**, eldonita en urbo Cluj en 1898.

Mondlingvo: Esperanto. Honore al verkinto de tiu libro, kiu eldonis la unuan Esperanto-lernilon por Hungaroj - la centjariĝon festanta esperantista societo en Oradea represigis lian verkon.

Mi partoprenis du esperantistajn landajn kongresojn. En la montaro Bucegi en 1987, kie mi ekkonis sinjorojn Ionel Onet kaj Marian Vochin kaj en Timisoara en 1991. Mi vizitis geesperantistojn en urbo Eger, okaze de tio mi verkis mallongan poemon al ili.

Ni salutas vin, gesamideanojn de Eger,

Estu kun gajeco kaj l'esper'.

Ne krokodilu hungare pli multe,

Do, parolu esperante, se eble.

En la jaro 1993/1994. mi partoprenis kun aliaj du esperantistoj en Oradea la korespondan kurson „Internacia korespondaj studoj pri Esperantologio”, okaze de tiu mi studadis la sekvajn studobjektojn: interlingvistikon, esperantan literaturon, morfologion kaj sintakson, esperantan gramatikon kaj lingvopraktikon. Mi konvinkiĝis, kiel perfekte ni povas uzi Esperanton. Malgraŭ de tio, Esperanto estas nuntempe en ondo-valo. Unuflanke, laŭ mia opinio, ankoraŭ ne estas politika bezono por estigi Esperanton mondlingvo, aliflanke la homoj ne dediĉas tempon por Esperanto. Kial? Ĉar multe da personoj ankoraŭ ne aŭdis pri ĝi kaj ne konas ĝin.

Kion fari? Laŭ mia opinio ni devas konigi kaj disvastigi ĝin per ekspozicioj kaj per la modernaj komunikiloj. Ni devas traduki produkavizilojn / instrukcioj pri uzado de produktoj ankaŭ en Esperanton. Kiu traduku? Ni, geesperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo. Kiam? Nun, en jaro 2010 kaj konstante.

Mi dankas por via atento.

Oradea, aprilo 2010

Johano Csapó

13.08.Mondotago de la Maldekstramanuloj

La uzo de maldekstramano ne estas kutimiĝo – asertas niaj kuracistoj -, sed sur biologiaj fundamentoj baziĝanta manuzo preferanta la uzon de maldekstramano kontraŭ la dekstra. Maldekstramanaj estis ekzemple en la antikva epoko: Aleksandro la Granda, Cezaro Julio, kaj en nia nunepoko: nia hungara poeto Sándor Petőfi, la boksisto László Papp, la piedpilkisto Ferenc Puskás kaj ankoraŭ ankaŭ multaj aliuloj.

(Laŭ la Hungara Libera Enciklopedio kompilis kaj esperantigis: s-ino Adri Pásztor)

La sensa vojaĝo

„Pro flego de beleco la farigo de tensio, por konservi la junecon, la virinoj multe elspezas. Sed ĉi terapioj ne estas agrablaj ĉiam. Oni diras: „por akiri belecon, oni devas suferi.” nun la terapeŭtuloj eltrovis, ke por la rejuniĝo de la korpo ili aplikos naturajn kreskaĵesencojn, mineralaĵojn kaj la kombinaĵojn de la tuŝoj. Dum ĉi ties apliko, la gasto povos senti sin kvazaŭ estas ŝi en Marokko, Polinezio, Amazonio, Azio, aŭ en areo de la Atlanta-oceano, ĉar la gasto parton ricevas el la plibeligaj teknikoj, kreskaĵoj kaj esencoj, mineralaĵoj, masaĝoj kaj la relaksaj muzikoj karakterizaj al la cetera areo” – mi legis el iu gazeto ĉe la virina frizistejo.

s-ino Adri Pásztor

Urbo Komárom – „Monostori-erőd” / Fortreso Monoŝtor Entempa revojaĝo

La Monoŝtor-Fortreso de urbo Komárom proponas por rigardi pliajn ekspoziciojn de la Danub-apudaj metioj, pere de kiuj ni povas rerigardi en la pasinton, dum ĝi pensojn vekigas pri niaj nun kaj estonto. Unu ekspozicio prezentas la diversajn ŝiptipojn kaj ŝipmuelilojn konstruitajn en urbo Komárom. La nomo de la alia nun menciinda ekspozicio estas:Pano-muzeo.Bedaŭrinda estas, ke la muzeo fermita estas dimanĉe kaj dum festotagoj kiam pli da ekskursantoj, kaj la dumsemajne laborantaj gelaboruloj povus viziti ĝin. Tamen ĉar nun someras kaj la ekspozicioj estas interesaj, valoraj, mi proponas rigardi ilin. La vizitantoj konantaj la hungaran lingvon, povos viziti ankaŭ la retpaĝon de la Pano-muzeo. Jene::

<http://www.pekrend.shp.hu/hpc/web.php?a=pekrend>

<http://ne-legyenek-elfeledve.hupont.hu/1/kezdolap>

<http://ne-legyenek-elfeledve.hupont.hu/1>

s-ino Adri Pásztor

La hamstro kaj Dio la Ĉiopova

En la vasta valo inter la du arbaraj deklivoj de la karsta montaro, la homoj produktis maizon, luzernon kaj cerealojn.

La hamstro loĝis kune kun sia familio sub la luzernejo. La bone elformitaj subteraj galerioj de la vivantejo protektis la posedanton kontraŭ la vintra frosto, donante por ĝi varman hejmon, nutraĵojn kaj ŝirmejon. Ties galerioj havis kaj en-, kaj elirejon. La hamstro saĝe provizis sin

ankaŭ per vojo por eskapi. Tiu kondukis sub grandan rokon kuŝantan ĉe la arbarsube fluetanta rivereto ĉirkaŭitan per densa herbejo kaj tusilagoj. Por la hamstroj la naturo disponigis multe da kaŝejoj en la zigzagoj de la roko.

Ĉiumatene la hamstro-paro ekiris por akiri nutraĵojn por manĝigi siajn idojn per la kolektitaj grajnetoj. Sed foje la virhamstro senŝpure malaperis. Kion fari? La hamstrino devis sole daŭrigi la manĝaĵkolektadojn por la idoj. Ĝi devis plurfoje forlasi sian ŝirmejon, ĝis la malsatajn stomakojn de siaj etaj idoj ĝi povis plenigi per la semetoj kolektitaj en siaj buŝegsakoj.

Iumatene la hamstrino plenigis unue sian stomakon, poste plenpleniginte sian buŝegsakon, ekiris hejmen. Ĝi jam ne estis malproksime de sia hejmo, kiam devis ripozi kelkajn minutojn, ja plenplenstomake kuri estis laciga. Subite ĝi ekrimarkis la ombron de serpento kliniĝanta super ĝin. La hamstrino terure ektimiĝis. Kiam la serpento komencis etendigi sian forkan langon al ĝi, la hamstrino kompreninte la minacantan danĝeron, alparolis la serpenton:

- Bonan matenon, sinjoro! Ĉu ankaŭ vi ĝuas la unuajn sunradiojn?

La serpento pli alproksimiĝis, atenteme rigardis la hamstrinon, kaj respondis:

- Ho, jes, sed mi plie ŝatus matenmanĝi, ĉar jam du tagojn mi ne manĝis. Poste mi portus matenmanĝaĵon al miaj idoj, kiuj ĵus eliĝis el miaj ovetoj. Mi vidas, eble ankaŭ vi havas idojn, ĉar via ventro estas maldika. Vi estas malgrasa, sed vi estus por mi bona matenmanĝo.

La hamstrino vidante, ke nur la hazarda feliĉo povus savi ĝin, ekpetegis la serpenton, ke tiu ne volu tuj manĝi, atendu iom, eble povos kapti ian pli grandan viandaĵon.

- Mi atendas mian paron – diris la hamstrino – ni renkontiĝos kun kukolo, kiu vidis ie bonajn semetojn. Ilin rigardante la kukolo pensis pri niaj idoj, ke pro tiuj bonaj grensemoj niaj idoj pli bone kreskiĝos. Atendu la birdon, kio certe ne venos sola...- petegis la hamstrino la serpenton.

- Nu, kvankam mi estas vere tre malsata, mi eĉ povas atendi kelkajn minutojn – pensis la serpento kaj serpentumis iomete malantaŭen-

Ĉi momenton eluzis la malgranda hamstrino por proksimiĝi al la roko. Dume ĝi ekpreĝis:

- Ho, Ĉiopova! Ho, mia granda Di'! Savu, nur nun unufoje mian vivon! Nur nun, unufoje helpu min, ĉar se mi ne estos, kiu nutros miajn etulojn? Ili ĉiuj malsatmortos sen mi! *Se vi savos min, ĉiam miaj idoj estos la unuaj por manĝi, kaj mi estos la lasta!*

Kaj tiam diris Dio:

- *Eksciu ci hamstrino, ke Mi, la Ĉiopova havos gracon al vi, mi savos vian vivon, ĉar vian promeson mi prijuĝas serioza. Sed poste ne forgesu vian promeson, ĉar tiam mi ne donos jam plian gracon al vi!*

La hamstrino jam levis supren sian kapon esperante, kiam la serpento rimarkinte la rifuĝvolon, ĵetis sin al ĝi, por kapti la rifuĝi volantan.

Sed tiumomente, kiam la serpento ekmoviĝis, kiel fulmobato elĉiela, falegis iu granda korpo tuj apud la hamstrinon. Ĝi timtremeĝante sentis kiel tuŝas sian bruston grandaj ungegoj.

Kiam la paralizanta terurego ĉesis kaj la hamstrino ĉirkaurigardis, ĝi ekvidis la serpenton, sian malamikon pendantan el la beko de granda aglo fluganta al la alta ĉielo.

La hamstrino eĉ ekkompatis iomete la malamikon, sed tamen ĝojis, ke ne ĝi fariĝis predo de la aglo.

Sinjorino Adrienne Pásztor

240 jaras la Ferfabriko de Miskolc

Informilo de la Centra Metalurgia Muzeo kaj Maŝna/Lignokarba Altfornego/ Muzeo

Antaŭparolo

Unu el plej prajj industriaj metioj, - la ferindustrio-, de ĝia apero decidigan ŝanĝon kaŭzis en evoluohistorio de la homaro. Pro ĝia rolo, efiko, konstanteco ĉi tiun etapon oni nomas Ferepoko.

Kontraŭ tio, ke en nia moderna mondo, kiam la artefaritaj aĵoj pli avantaĝaj estas ol la fer-, kaj ŝtalproduktaĵoj, ankoraŭ plu ĝi restis grava bazmaterialo de preskaŭ ĉiuj industribranĉoj. La teknika evoluo de maŝin-, kaj instrumentfabrikado, aŭtomobilindustrio, agrikulturo neimagebla estas sen tiuj.

Okaze de verko de ĉi tiu informilo gvidis nin tiu celo, ke la kara vizitanto tiun enmane tenante povu facile orientiĝi inter la vidindaĵoj de la ekspozicio. Ni volis ankaŭ tion, ke krom de la ekspozicio kaŭzita spertaĵo unu instruaĵon, restantan memoraĵon portebli kun si mem la vizitanto.

En tiu espero ni donas al vi nian konstantan ekspozician informilon, ke tiu helpu konservi por la estonto la ĉi tieajn vidindaĵojn.

En tiu espero ni deziras al niaj ĉiuj vizitantoj en niaj muzeoj agrablan kaj utilan tempopasigon kun la praa ministra-metalurgiista saluto:

Bonŝancon!

Konstruaĵo de la Centra Metalurgia Muzeo

Post la 1770. jara fondigo de ferfabriko de Diósgyőr en jaro 1776. la fisko transprenis la direktadon. La teknikan kaj ekonomian inspekton funkciigis la en Selmechánya rezidanta minejĉefkamergraflando, kiun kontrolis la minekspluata kaj financa institucio de la viena kortega kamero.

En 1777. la ĉefkamera grafeco decidis tiel, ke bona estos farigi pri la fabriko detalan teknikan analizadon. Do, ili elsendis unu inĝenieron kaj ekonomikiston de Körmöcbánya, nome Johanon Nep. Fierer, kiu donis tre interesan kaj instruan analizadon pri la fabriko. Li inter aliaj taksis bezonata ankaŭ konstruon de unu centra oficejdomo. Laŭ liaj planoj oni formis sur la teretaĝo la fer-, kaj pret-,vardeponbejojn, provizon de la laboristoj servantajn nutraĵdeponejojn, kies konstruon permesis la 1574. jara Mikŝa-speca minejleĝo.

Sur la unua etaĝo ricevis lokon la ekonomia estro de ferfabriko, sur la dua etaĝo estis serva logejo kaj oficejo de la kontrevizoroficisto. Kosto de konstruo de la konstruaĵo estis laŭ la budĝeto 2584 forintoj kaj 24 krajceroj. Elfoso de la bazoj komenciĝis en aprilo de 1778., kaj jam aŭtune la konstruaĵo estis sub tegmento. Laŭ ties destino la konstruaĵon oni transdonis en junio de 1779. Henrik Fazola, la fabrikfondinto, kiu mortis la 16-an de aprilo 1779., ankoraŭ povis vidi konstruantajn murojn de la nova oficejdomo „Kancelario”.

En 1968, la konstruaĵon oni transdonis post interna rekonstruo por muzeaj celoj kaj komenciĝis garniturado de la ekspoziciaj objektoj. La muzeo iĝis vizitebla en julio de 1970., kiam estis 200. datreveno de fondigo de la fabriko. En jaro 1985. la muzeon la Miŝkolca Urba Konsilantaro deklaris artobjekto.

Paŝante en antaŭejon de la muzeo, maldekstre ĉe la ŝtuparejo videblas unu Fazola-stila en 1977. de la diósgyőr-aj forĝistoj preparita ornampordego. Sur la muro malantaŭ la pordego ni rigardas originalajn dokumentojn pri la konstruaĵo.

Irante sur la unuan etaĝon, maldekstre rigardante en la fenestra embradura unu ferercopeco videblas el urbo Rudabánya. Suprenirante en la antaŭejon, ni vidas dokumentojn pri Würtzburgaj laboroj de Henrik Fazola, iamaj kartoj, 18-aj jarcentaj dokumentoj de malsupra hungaruja minejdirektado kaj eger-urba pordego estas metitaj. Ĉi tie ni povas vidi aŭtentikan kopion de tiu letero, kiun reĝino Terezia Maria sendis en afero de fondigo de la ferfabriko la 28-an de julio 1770, al la Hungara Kamero. Ĉi tie estas originala presaĵo de Schmidshausen-

speca sigelo de la fabriko, kiu estis pretigita, kiel ties unua originala sigelo. Ĝi pretiĝis en la jaro 1776.

Apud enireja pordo de la unua ĉambrego ambaŭ duflanke staras metalurgiiststatuo de Cs. Stefano Kaltenbach kaj László Siklódi. Poste sur la dekstra flanko muro ni povas studadi evoluon de gravaj, bezonaj solidaj brulmaterialoj de la fermetalurgio.

Inter la fotoj kaj gravuraĵoj ĉi tie estas videbla la sur loko de la altfornego de Diósgyőr trovita, pli ol 200 jara skoria lignokarbo kaj koakso de Dunaújváros, kie estas la plej granda koaksigada uzino de la lando. Sub ĝi ni metis la el alumetoj pretiĝintan maketon de la altfornego de Újmassa, „praa fornego”, kiu estas kreaĵo de Ludoviko Kugler, Kossuth-premia laminatisto. Sur la alia flanko estas maketo de la Ercantaŭprepara Kombinato de Borsod, super ĝi estas unu metalurgia procezdiagramo, kiu demonstros de la bazmaterialo ĝis la pretvaro la procezon de prilaboro de la fer-, kaj ŝtalvaro.

De tie ĉi ni paŝas en la unuan ĉambregon, kie estas prezentite evoluo de la krudmaterialproduktado. La historian evoluon la 16. jarcenta minist,-metalurgiistscienculo Georg Bauer /Agricola/ el la ”De re metallica” titolita libro farita grafiko, kiu figuras la rektan reduktan ferercfandon.

Dekstre dioramavico prezentas, kiel ekstraktis el la ercoj diversaj popoloj de diversaj epokoj la metalojn per balgblovilo. La kvarpartan prezentadon ĉi tiu muzeo aplikis kiel unua por pli bone eluzi la disponeblan teritorion.

Sur la malsupra postamento oni metis la pli pezajn objektojn, en la superaj vitrinoj estas objektaj memoraĵoj de la diramo. Sub la dioramoj oni figuras aŭtentike kaj per estantaj dokumentoj metalurgion de la diversaj epokoj kaj landoj. Super la dioramoj estas videblaj pli malnovaj kaj pli novaj labormetodoj.

La unua dioramo figuras unu oldan egiptan orfandantan uzinon el epoko de faraono Thotmes, la 4-a el a.n.e. /antaŭ nia erao/ 1450, ties bildon oni trovis sur muro de iu tombokamero en Théba.

La sekva dioramo prezentas la praan metalurgion en montaro Jura. En la sub tiu estanta vitrino estas videblaj 5-8. jarcentaj bloviletoj, kiuj oni trovis sur hungara teritorio.

Nia tria dioramo prezentas la tn. „slovakon fornego”, ĉe kiu la blovigo de la fornego jam okazis per akvorado. Sur la suba postamento oni metis la de Sopron, Hévíz, Szalacska devenajn gisbrikojn, kiuj laŭ la esploroj devenas el la 14-16. jarcentoj.

Nia sekva dioramo figuras la 17. jarcentan metalurgion de la nordaj popoloj, prezentate tion pere de Sveda kamparanbakforno. La ferfarado estis hejma etindustrio, kion montras, ke la familianoj partoprenis la ferfandadan laboron. Super ĝi sur la diorampentraĵo ni videblas plej simplan ferfandadon de sur la nordan, marĉan regionon atingitaj popoloj.

La kvina dioramo la de afrikaj popoloj faritan fandfornon kune kun la forĝistmetiejo dum mezo de la 19. jarcento en Kirumbo. La forĝistoj faris lancojn, diversajn tranĉilojn / poŝtranĉilojn, rikoltotranĉilojn, ktp./

Ĉe la sekva dioramo prezentiĝas la ĉina, al barelo simila fandforno, en kiu la ĉina metalurgiisto fandas stanon. Ĉi ties interesaĵo estas la al ligno pretiĝinta suĉanta-premanta daŭron fajroblovon akcelanta balgblovilo. Sub ĝi mez,-kaj malgrandaj, aziaj, turkaj kaj ĉinaj devenaj uzobjektoj kaj fotoj, sur la postamento japanaj bronzvazoj videblas.

Ĉi tiun sekvas tiu dioramo, kiu prezentas la de hinduja metalurgio la en 1890. ankoraŭ uzatan feraltfornon. En ĉi tiu forno oni fandis dum du horoj 7-9 kg-ojn de feroj La bloviloj prepariĝis el kaproledo. En la meza vitrino estas rigardeblaj hindujaj ĉastranĉiloj.

En la vico la lasta estas maketo de la el tero konstruita ferfandejo, kiu funkciis ankaŭ en 1957 en Kameruno /Afriko./ Al la ferfanda agado ligiĝis magia agado. Apud akompano de unu primitiva liuto la magiisto per birdosango akvumis muron de la fandejo kaj la ĉeffandisto invitis la spiritojn en intereso de la sukcesa fando. Sur la postamento en ferfabriko de Diósgyőr-Hámar gisitaj perpistujoj ricevis lokon.

Maldekstren irante inspekteblas statuon de Stefano Cserenyei K. fandisto. Apud ĝi estas la gisbrikfornoj de Imola, Kőszegfalva laŭ 10-12. jarcenta stato.

De tie ĉi turnante maldekstren la antaŭ la unua mondmilito konstruitaj funkciaj modeloj de ferfandejoj / el Ózd, el Diósgyőr/ estas videblaj. Pluirante estas pririgardebla maketo de en 1870. sur loko de la hodiaŭa fabriko konstruita, post kvin jaroj ĉesigita lignokarba altforno. Apud la pordo laŭ lumefiko funkcia modeloj demonstras sur tranĉa ilustraĵo la en moderna altforno okazantajn teknologiajn procezojn.

De tie returnante el la ferproduktada ĉambrego, ni iras en la ŝtalproduktadan ĉambregon. Ĉi tie dekstren ni ekkoneblas unue la en 19. jarcento disvastiĝintan ŝtalfaradan metodon, la kirlan metodon pere de unu maketo. Apud ĝi estas videbla hommezura statuo de Stefano Cserenyei K., fandisto. Pluirante maldekstre ni vidas la diversajn ŝtalfaradajn metodojn pere de modeloj kaj maketoj. Ĉi tie la vizitanto unue povas rigardi maketon de la Bessemer-ŝtalfarado kaj maketon de la krisolŝtalfarado. En vitrino de ĉi tiuj maketoj estas metite dokumentoj de laborado de Johano Topiczer, kiu estis en Diósgyőr ĉeflaborejestro de la krisolŝtalkombinato. Videbla estas ĉi tie ankaŭ la mondfama, patentigita inventaĵo, la 6. numera rapidtornantŝtalo „Megiston”, la el tiu farita rokĉizilo, kiun oni gisis en Diósgyőr kaj iĝis bonega ili ĉe riverregulado de Sub-Danubo.

Post ĉi tiu sekvas unu detalo de halo de Martin-ŝtalkombinato de Diósgyőr, poste unu pere de lungrafika metodo funkcia maketo, kiu demonstras teknologiajn kaj termoteknikajn procezojn de la Siemens-Martin ŝtalfarado.

Ĉi tie estas 1:50 skala maketo de la eksperimenta kontinua gisejo. Ĉi tiu havis gravan rolon en tiu, ke sen blokcilindrovico oni faris rekte gisbrikon el la fluanta ŝtalo.

La en 1911. instalitan elektran ŝtalfaradon la maketo de 10 tuna arkluma forno demonstras dum funkciado. Malantaŭ tiu ni vidas ankaŭ funkciantan maketon de la 50 tuna elektra ŝtalkombinato. Malantaŭ tiuj estas videblaj tranĉaĵoj de ingotoj de la Martin-, kaj Elektro kombinato.

Reirante al trairejo de la ĉambrego, en la vitrinoj ni trovas metalurgiistajn dokumentojn de Antono Kerpely, konata fermetalurgiisto. Inter aliaj lian pro sia laboreco riceviton nobelan diplomon, kiun pro lia en intereso de metalurgio farita agado li ricevis kaj lian akademian membrecon atestintan legitimaĵon, ktp.

Super la vitrinoj fotoj de la en fabriko de Diósgyőr aplikitaj fornoj kaj la metalurgiadon figurantaj statuoj estas videblaj.

La sekva maketo demonstras konstruon kaj funkciadon de la Kombinata Ŝtalkombinato en 1982. Ĉi tie estas kopio de la en bazon metita urno kaj duplikatoj de la en urnon metitaj dokumentoj. La maketo prezentas strukturon de la tuta Kombinata Ŝtalkombinato. Funkciadon de la UHP-forno ni prezentas sur lumefika skemotabulo.

En nia fergisada ekspozicio ni prezentas diversajn gisitajn objektojn, inter aliaj kaserolojn, tabulojn, tombotabulojn kaj fornojn. Sen tuteco ni prezentas tie ĉi memoraĵojn el Diósgyőr, ĉar objektajn memoraĵojn de la hungara metalurgio la Budapeŝta Fandea Muzeo prezentas detale, kiun oni malfermis la 24-an de septembro en 1969. en la de Ábrahám Ganz en 1845 fondita malmolkrusta fandejo.

Same ĉi tie sur la unua etaĝo ni antaŭpreparis tiun ekspozicion, kiu prezentas evoluon de la materialtestado, en kiu rolas ĉefe materialoj de Diósgyőr. Ĉi tie estas dokumentoj Sigmundo Fábry, kiu estis kreinto de la hungara metalografia laboratorio. Ĉi tie estas troveblaj instrumentoj, kiujn ankaŭ eksterlande oni taksas kiel industrihistoriajn artobjektojn, kaj la modernaj metalografiaj kaj metalfizikaj esploradaj materialoj.

De tie sur la ŝtuparo ni iru sur la duan etaĝon. En la antaŭejo sur la muro ni vidas tabulojn de diversaj laminitaj ŝtalprofiloj, kiuj oni produktis en Ózd kaj Diósgyőr. Apud ĝi estas videbla la de britaj kaj amerikaj flugmaŝinoj farita aera atako kaj ties pereiga efiko.

Sur la maldekstra muro de la antaŭejo ni rigardas rolon de la akvoenergio en la metalurgio. Inter aliaj ni vidas tiun leteron, kiun Frederiko Fazola sendis okaze de tio, dume pasigis tempon ĉe konstruo de lagobaraĵo-Hodrús. Estas videbla ĉi tie ankaŭ foto de valferma baraĵo de lago Hámori. Sub la foton oni metis maketon de unu moderna akva filtrilo-aparato. Paŝante en la ĉambregon malantaŭ la pordo sur la muro videbla estas makroskopa ŝmirita bildo de tranĉo de kelta fertranĉilo el la „La Tene”-epoko laŭ iama forĝada teknologio, skene rekonstruante figurante.

Diorama-vico prezentas evoluon de la forĝado de laminata martelado tra laboro de la epokaj armilmajstroj ĝis la trogoĉena vosta martelo. Ĉi tie estas metite ankaŭ reliefoj de kelkaj famaj fakuloj de la metalurgio. Sufiĉe grandan sortimenton ni trovas el la mecenze-faj agrokulturaj laboriloj, kiuj ankaŭ dum multaj jarcentoj konservis siajn formojn. El samaj laboriltipoj konsistis en la 18.-19. jarcentoj la laborilgarnituro forĝistada, laborilstoko de ferfabriko de Diósgyőr. Ĉi tiun sekvas en vico la 1:5 skala maketo de larĝiga martelo de falĉilfabriko de Szentgotthard. Samaj vostomarteloj funkciis ankaŭ en la de Henrik Fazola fondigitaj gisejoj. / Sur la postamento apud ĝi estas rigardebla vico de funkciigaj maketoj, kiuj prezentas evoluon de la forĝadaj maŝinoj tiujn maketojn faris industriaj lernantoj. En fino de ĉambrego unu grandforma pentraĵo figuras teknologiojn de la mana kaj la maŝina forĝado. Sub la bildo fervojaj radoj, bufroj kaj aksoj de Diósgyőr estas videblaj, en kiuj nek post premoprovo oni povis demonstri fendigon.

Maldekstre irante ni rigardas unun funkciantan manipulilan forĝadan maketon. Returnante al enirejo de la ĉambrego, dekstre estas videbla maketo de unu Nikolson vapormaŝino, poste unu maketo de lokomotivrado-tornilo kaj unu hidraŭlika radopremilo. Super ili sur la muro landkarto-grafiko prezentas disvolviĝintan staton de la fervojreto meze de la 19. jarcento. Ni vidas originalan propraman skizon de Antono Péch de 1867. pri konstruo de la ferfabriko de Diósgyőr. Laŭ la ekspoziciitaj plandokumentaroj evoluigon de la ferindustrio bezonis granda utiligo de la fervojaj substrukturoj kaj ruliĝantaj materialoj. Sub la dokumentoj estas videblaj maketoj de 327. numera funkcia lokomotivo kaj tendro, kiuj portadis la varojn al Fiume en la havenon.

Ĉi tie estas troveblaj: el maketoj de krankoaksoj pretigitaj kompozicioj, diversaj puŝiĝnombraj rabotmaŝinoj, perpiedfunkciiga bormaŝino, ŝarĝadmaŝino, ktp. Ankaŭ ĉi tiujn industriaj lernantoj faris kiel praktikaj ekzamenlaboraĵoj.

De tie returnante ni iru en la laminatan teknologion prezentadan ĉambregon. La plej malnova dokumento estas grandioza grafiko de Leonardo de Vinci. Ni studas maketon de akvarada laminatejo de Rhonic, kiu estas unu el la plej malnova tipo de la hungaruja laminatejo. Super ĝi estas maketoj de bloko kaj gisbrikovico de laminatejo de Diósgyőr. Same ĉi tie estas videbla la 1896. jara panoramo pri ferfabriko de Diósgyőr kaj ties ĉirkaŭaĵo, la loĝkolonio. .

La nova ferfabriko de Diósgyőr konstruiĝis en 1870., kiu aĉetis multe da uzitaj relmaterialoj de la Tibiskaj kaj Nordaj Fervojsocietoj. Ĉi ties unun parton oni ektravis el inter ruĵoj, montrante, ke multspecajn subkonstruaĵajn materialojn oni uzis al la iamaj hungaraj fervojoj. Ĉi tie estas prezentite reloj de Rhonic, Schneider-Creuzot, Bochumen-Verein-Kombinatoj de la kirlita ŝtalreloj de Diósgyőr ĝis la Martin kaj Bessemer-ŝtalreloj.

Ĉi tie ni prezentas aliajn grandajn hungarlandajn ferkombinatojn pere de dokumentumbildoj, kiel ekz. iamajn kaj pli novajn karakterajn produktaĵojn de Danuba Ferkombinato, Salgótarján, Ózd, Csepel, Borsodnádásd. Ĉi tiuj estis signifaj en dua parto de la 19. jarcento, ĉar certigis la relmaterialojn al la konstruo de la ferfabriko.

En malantaŭa parto de la ĉambrego ni prezentas historion de drato,-kaj ŝraŭbfarado. Teknologion de dratfarado de la malfrua mezepoko prezentas unu diaramo, unu granda tranĉo-grafiko kaj unu originala dratmaŝkiraso.

Ni prezentas produktaĵojn de Dratfabriko de Miskolc kaj sortimenton de la Dratfadenfabrikado. Ni vidas la dratfadenfabrikadon pere de maketo. Apud ĝi estas maketo de drattiriga maŝino. Apud tiu estas unu malsupra kabla dratŝnurtorda maŝino.

Ĉe la elireja pordo estas videbla maketo ŝraŭmofabrika prema-maŝino, apud kiu estas multe da ŝraŭbfabrikaj produktaĵoj. Ekz. en muelejoj uzitaj diversaj muelantaj globoj, relfiksantaj ŝraŭboj, ŝraŭbingoj, ŝraŭbdisketoj, ktp.

Super la maketo de la prema-maŝino sur la muro estas videblaj fotoj de la najlofabriko, sub ĝi estas originalaj produktaĵoj de la fabriko. La najlofabriko estis antaŭo de la ŝraŭbofabriko.

Maŝina Muzeo de la Centra Metalurgia Muzeo

De Palachotelo de Miskolc-Lillafüred, koncerne de antaŭo de lago-Hámori je tri kilometraj distanco al okcidento ni trovas sur la al vilaĝo Ómaŝsa iranta vojo la unuan industrian artobjekton de Hungarujo, la lignokarban altfornon /praan fornego/ de Újmaŝsa /Novmaŝsa/. Apud estas videbla la Maŝina-muzeo, kiu prezentas centan jaran historion de la Henrik Fazola fondita feruzino de jaro 1770 ĝis jaro 1870.

Enirante en la muzeon ni vidas unun, el libro de Georgius b. Agricola pligrandigitan sekcon, kiu figuras la akvoradan forĝadon.

Dekstren en la unuan ĉambregon paŝante kontraŭe ni vidas buston de la fabrikfondinta Henrik Fazola. Malantaŭ ĝi estas klariga teksto.

Sur la dekstra muro kun 1770. jara subskribo de Tereza Maria, reĝino estas videbla kopio de la fabrikfondinta letero. Ĉi tie videblas kopioj de originalaj krokizoj kaj tiamaj iloj. Malantaŭ la busto videblas foto de vilaĝo Hámor de 1849.

Maldekstre plu irante sur la postamento videblas originalaj iloj kaj maketo de la en jaro en Ómaŝsa konstruita lignokarba fornego, tiel same gisitajn originalajn kaserolojn.

Pluirante en la ĉambrego videblas maketo de dumartela, akvarada gisejo, super ĝi videblas ties laborbildo. Antaŭ la elirejo sur la muro videblas sekco de la alta ŝtonfornego, sub ĝi estas unu en vilaĝo Ómaŝsa gisita kaj uzita amboso. Sur mezo de la ĉambrego oni metis unun originalan gisejŝtipon, kiu estis bazo de unu en akvoradaj gisejoj uzita amboso.

Alvenante en la duan parton de la muzeo, de dekstro irante ĉirkaŭ la mezaj postamentoj unue videblas iamaj sigelreproduktaĵoj de la fabriko kaj el la tombejo de Hámor devenaj gisitaj epitaĵoj kaj iu meĉo, kiun oni uzis en minejo de vilaĝo Uppony. Super ĝi sur la muro estas foto de ferma digo de la lago-Hámori. La digon Frederiko Fazola estigis en jaro 1810., kiu servis akvoprovizadon de la gisejoj. Apud ĝi estas unu reĝon Matiason figuranta reliefo, poste unu gisita tendara kaldrono, kiun oni gisis por la armeo, kiu konstruis la lagodigon. Ĉi tiu tendara kaldrono estis farite en Újmaŝsa per apliko de argil,-kaj sabloformoj..

La mezan muron fermas grandioza foto de iu gisejo, ĉi tie estas videbla busto de Frederiko Fazola.

Al maldekstro turniĝante ni vidas unu „Empiro” stilan gisitan fornego, sur kiu estas belaj, hungaraj motivoj, super la forno videblas uzaj vazoj.

La vicon sekvas gisa tombotabulo de edzino de Henrik Fazola, kiu estas germanlingva. Ties traduko estas la sekva:” Ĉi tie ripozas Tekla Fazola, patrino de loĝantoj de ĉi tiu pitoreska valo. Mortis en 1831.”

La sekva maketo demonstras la lignokarban altfornego de Újmaŝsa, la tn. „praan fornego” en ties originala stato. Super la maketo ni rigardas desegnaĵon de fercilindra bormaŝino. Sur ĉi tiu muro videblas unu en Újmaŝsa forĝita barelbrendo.

Sur la mezo de la ĉambrego sur la postamento videblas el la fornego de Újmaŝsa elfluigitaj skoriopecoj, kruda fererco de Uppony, iamaj maniloj kaj desegnaĵoj. El inter la dokumentoj estas interes la dum 1831. jara ĥolerokontaĝo sendita skribaĵo, kiu estas truite laŭ la regulo, ĉar tiun devis seninfektigi pro la kontaĝo.

Same ĉi tie estas trovebla kolora desegnaĵo de Johano Köves pri la malboniĝinta stato de praan fornego, kiun li pretis en intereso de rekonstruado de la praan fornego.

En nia tria ĉambrego estas forĝitaj lustroj, pesiloj, bele gisita forno, kiuj demonstros forĝistadan kaj gisadan arton de la epoko.

En nia lasta prezentada ĉambrego vi povas koni tiujn ilojn kaj fabrikaĵojn pere de fotoj kaj objektoj, kiujn oni uzis en la manaj kaj akvoradaj gisejoj. Teknologia vico de rastro,-kaj falĉilfarado vivfidele demonstros formigon de la en akvorada gisejo fabrikitaj laboriloj.

Forlasante la muzeon sur orienta flanko de la konstruaĵo, de tiu je 30 metraj distanco ni trovas unuan industrian artobjekton de Hungarujo la lignokarbon altfornegon de Újmaŝsa, la tn. „praan fornego.” Sur muro de la fornego metita tabulo konigas tempon de la konstruo kaj jaron de la rekonstruado.

Pluirante de la praan fornego maldekstren ni vidas unu en 1979. konstruitan akvoradan gisejon, ties meblaro estas laŭepoka. Ni trovas ĉi tie vostamartelon, forĝistfajrejon, blovilon, akrigilon kaj iamajn ilojn. Forlasante la gisejon, kontraŭ la muzeo sur alia flanko de la landvojo ni formigis nian metalurgian subĉielan muzeon, skanzenon, kie de la entreprenoj eksigitaj – sed metalurghistorie ankoraŭ signifaj – grandaj maŝinoj, iloj estas demonstrite.

Karaj niaj gastoj! Ni esperas, ke nia ekspozicio plaĉis al vi kaj vi pasigis vian libertempon agrable. Bonvolu informi viajn amikojn, konatojn, parencojn pri la viditaj. Kun ĝojo ni atendas ĉiujn en nia muzeo.

Ĝis revido!

La eldonaĵon kompilis István Séllei, direktoro de la Centra Metalurgia Muzeo, esperantigis
László Pásztor





NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.uw.hu>